8-a JARO, N-o 386

LEIPZIG, 21. / 4. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO


SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

Unua de majo — Tago de laborista solidaro.

La Unua de Majo estas kvazaŭ ekrigardo al nova, belega mondo, al ia malproksima ĝojoplena estonto — ia ĝardeno de edeno! Kuraĝigon donanta al la klaso de l'ekspluatatoj, kunforĝitaj per la komuna mizero, ĝi estas sentata kiel blasfemo, sakrilegio de la reganta klaso: Sklavoj arogas al si la rajton dekreti propran festotagon, eĉ tutmondan! Tion ne povas sankcii la burĝaj leĝoj, k oni devas ŝirmi la burĝan publikon kontraŭ tia minaco al sia „ordo".



Tio okazas diversmaniere: Kie tio estas ebla, oni prisilentas tute la ekziston de l'laborista festotago; kie la laboristaro havas atentindan pozicion, oni estas devigata paroli pri la okazo, sed oni faras tion kun ia hipokrita ŝajndemokrata indulgemo k toleremo, aludante pri la „Festo de la Laboristoj", kiel oni parolas pri „Printempa Festo", la „Festo de l'Konvalo" aŭ similaj konvenciaj festoj de l'burĝaro, kiuj servas al marĉandistoj por disvendi florojn aŭ senvalorajn memoraĵojn. Ne okazas malofte ankaŭ, ke burĝaj ĵurnaloj primokas k kalumnias la „senkolumulojn, kiuj en tiu tago trovas bonvenan okazon por sin ebriigi" ktp. ks.

Unua de Majo — tago de laborista solidaro, tago de varbado, de revuado, — bataltago, ne en tiu senco, ke estu fiksata por tiu dato la eksplodo de l'mondrevolucio, sed en la senco de potenca alvoko al la indiferentaj samklasanoj enviciĝi en la armeo de tiuj, kiuj batalas por la emancipado de sia klaso, alvoko al la racio, veko de la konscio dormigita k rekuraĝigo al tiuj, kiuj batalante malkuraĝiĝis.

Sed ĉu ĝi estas la grandiĝanta mizero, kiu arigas la suferantojn en la vicojn de l'klaskonscia anaro? ĉu la multmiliona senlaborularo staras tie? Ne! la faktoj malkonfirmas tian supozon. Kaj hodiaŭ la pozicio de la proletaro antaŭ la kapitalistoj estas malfirma, necerta, malgraŭ la fakto, ke la malnova sistemo trapasas nuntempe profundan krizon, kiel neniam antaŭe. Sed la mastroj ne havas kontraŭ si unuigitan, solidaran batalantaron; la diversaj armepartoj marŝas disigite, eĉ interbatalantaj, anstataŭ ataki la komunan malamikon . . . En la momento, kiam la proletara unueco estus pleje necesa k profitodona, la disdividiteco atingis altegan gradon k paralizas ĉian sukcesan agadon.

Tamen, en tiu ĉi momento ankoraŭ de profunda skismo ĉe la organizita laboristaro, en la koroj de ĉiuj klaskonsciaj proletoj restas koncentrita unu komuna espero al luma punkto en la nigra bildo: restas la fido, ke la *sovetia* proletaro eltenos k sukcesos finkonstrui tion, kion ĝi komencis kun admirinda energio k kio devas konduki al socialisma sociordo.

En la tago de *tutmonda* laborista solidaro, en la Unua de Majo, la SAT-anoj sentas aparte ardan deziregon esprimi sian ligitecon kun la sovetiaj laborfratoj k ilia verko. Pli ol iam ajn nia anaro, kvankam malmultnombra, konscias en tiu ĉi tago pri la dinamika forto, kiu kuŝas en la konstanta praktikado de artefarita, al ĉiuj komuna lingvo. Esperanto iun tagon, en antaŭvidebla estonto, faros el la Unuamaja Tago vere tion, kion pri ĝi antaŭvidis k per ĝi aspiris ĝiaj iniciatintoj: la Tagon de *efektiva*, ne nur perparola laborista solidaro tutmonda — tiam, kiam ĉiuj proletoj de la mondo interkompreniĝos per unu la sama lingvo!

ELEKTO DE REGNA PREZIDANTO EN GERMANIO.

Semajnojn de pasia batalo (kiu kelkfoje eĉ estis sanga) travivis Germanio. La sepjara oficperiodo de Hindenburg finiĝis, k la popolo devis denove elekti sian plej altan funkciulon.

La germania popolo travivas tempon de plej granda ekonomia krizo, senlima senlaboreco (hodiaŭ certe jam sep milionoj), netolerebla mizero. Tiuj malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj helpis al radikalismo. Senlaboreco ĉe laboristoj, malprogreso de ĉia negoco, bankrotoj ĉe la burĝaro nebuligis la cerbojn: Savon nur povas alporti tiuj, kiuj plej laŭte ĝin promesas. Kaj kreskas la ekstremoj en la politika vivo, dekstra k maldekstra! Depost 1929, kiam okazis la lastaj elektoj al germania parlamento, en la regno orda regado per la parlamento ne plu estis ebla. La partioj de l'opozicio (maldekstra k dekstraj) estis unuecaj en neado, sed kompreneble malebligis ĉian pozitivan laboron. En tia situacio la elekto de nova regna prezidanto estis afero tre ekscita. Prezentiĝis kvin kandidatoj: Telman (Thälmann, komunisto), Hindenburg, Dusterberg (germannacia), Hitler (faŝista) k la lasta pro kuriozo estu nomata: iu Vinter, kiu propagandas la revalorigon de la antaŭmilitaj milmarkaj biletoj! !

La socialdemokrata partio ne povis konsideri la starigon de propra kandidato, ĉar tute ne estis eblo, ke li venku. Same ne estis konsiderinda la starigo de komuna kandidato kun la komunistoj. Tio signifas politikan neeblon. Sed eĉ supozante ĝian eblon, ĝi neniam povus sukcesi. Laŭ la lastaj elektoj (1929) socialdemokratoj k komunistoj kune havis preskaŭ 13 milionojn da voĉoj. Por la venko necesus la duono de ĉiuj voĉoj, preskaŭ kvin milionoj pli. De nenie tiu amaso estis akirebla. La socialdemokratio ekkonis, ke la plej granda danĝero estas Hitler, kies venko signifus, ke en Germanio per la Nacisocialista Partio estus starigita faŝista reĝimo, diktatoreco simila al tiu en Italio. La germania laboristaro jam iomete povis gustumi la regmanieron de la nacisocialistoj, kiuj havas la potencon en Turingio k Brunsvigo. Tie kelkfoje la faŝistoj eĉ rajtas ordoni al la polico.

La venko de Hitler ĉiel devis esti evitata. Li estis la danĝero por la laborista klaso. Kaj por malefikigi tiun danĝeron, la partio nur havis unu eblon subteni tiun kandidaton, kiu sola povis atingi la venkon kontraŭ Hitler. Estis Hindenburg. Li ne estas socialisto k neniam estos. Li multe helpis al pligrandigo de la mizero per la „krizaj dekretoj". Restas granda debeto en la kontlibro, kiun devos prezenti al li la laboristaro. Sed por la nuna momento la pli granda danĝero estis Hitler. Hindenburg signifas mizeron, sed Hitler signifas nuligon de ĉia laborista rajto, signifas, ke la faŝistoj disponas pri polico k armeo.

Konforme al la Komunista Manifesto la socialdemokratio provizore kuniĝas kun la burĝaro (pli ĝuste kun parto de ĝi) por forigi la danĝeron de nova absolutismo: de Hitler-a diktatoreco.

La komunistoj forte kontraŭbatalis tiun sintenon. Por ili Hindenburg estis same danĝera kiel Hitler. Tamen sub regado de Hindenburg ili ekzistas kiel laŭleĝa partio, povis manifestacii sur la stratoj ktp. Neniam sub Hitler komunistoj k social-demokratoj havus ian ajn rajton. La komunistoj tre bone sciis, ke neniam ilia kandidato povus venki. Ili nur batalis por malutili al la socialdemokratio. Kaj ili esperis fortiri plej multajn voĉojn de tiu partio. Ĉar kompreneble la postulo al la socialdemokrataj elektantoj, baloti por Hindenburg, estis forta streĉo: estis postulo, elekti inter sentimento k racio. Laŭ sentimento la voĉdono por Hindenburg estis simple neebla. Sed laŭ racio ĝi estis nepre necesa, ĝi estis la sola eblo por venki super la faŝismo. La germ. laboristaro per sia voĉdono pruvis, ke ĝi kapablas agi racie, ĝi sekvis al la postulo de l'partio. La „Fera Fronto", formita el la anoj de „Regna Standardo", Socialdem. Partio, Sindikatoj k Lab. Sportuloj, batis unuafoje k venkis.

Por Hindenburg voĉdonis krom la socialdemokratio la katolika partio „Centro" k aro da malgrandaj burĝaj partioj.

Jen la rezulto de l'unua balot-iro (inter krampoj la nombroj de la lastaj elektoj al parlamento, 1930):

Hindenburg	18 661 736	(21 165 410)
Hitler	11 338 571	(6 379 672)
Telman	4 982 079	(4 590 160)
Dusterberg	2 557 876	(2 457 686)

Hindenburg preskaŭ atingis la necesan absolutan plimulton: Voĉdonis 37 660 394. Necesiĝis dua elekto inter Hindenburg k Hitler, en kiu la venko de l'unua estas certa.[1]

El la nombroj oni povas konstati, ke grave kreskis la faŝismo. El la burĝaj partioj multaj elektantoj transiris al Hitler, certe ankaŭ parto de laboristoj.

Plue oni devas konstati, ke malsukcesis la komunista partio per sia devizo: Hindenburg egalas al Hitler, batalon al la socialdemokratio. La espero, ke foriĝos multaj socialdemokrataj membroj k elektos Telman, tute ne plenumiĝis. Konsiderante la pli grandan pocenton da elektantoj, la KP ne gajnis voĉojn. Laŭ la rezultoj ekz. en Berlin k Hamburg la KP eĉ malprogresis, perdante voĉojn.

La malgrandaj split-partioj: Socialista Lab. Partio k kom. opozicio sekvintaj al la Telman-a signaldiro, tute ne povis iel influi la rezulton. Se oni konsentas al ili kelkajn centmilojn da voĉoj, eĉ pli klare montriĝas, ke la germ. laboristaro ne plu sekvas la devizojn komunistajn, ke ĝi ne volas batalon inter la klasaj K-doj, sed batalon kontraŭ la veran malamikon, la faŝismon! Tiu batalo estos venka tiom pli rapide, se unueca laboristaro ĝin faras. Trans la burĝan respublikon kondukas la vojo al la socialista respubliko. Se la faŝismo regus en Germanio, tiam la tuta laboristaro povus forstreki kvindek jarojn da evoluo — ĝi povus ekkomenci la batalon denove por liberiĝo k demokratio. *Adolf Sproeck.*

[1] La rezulton de tiu *dua* balot-iro trovu sub „Reliefaj okazintaĵoj" en ĉi tiu n-o. — *Red.*

Por ŝtopi la breĉon

13. listo.

16953	Mauersberger (Penzig)	mk.g.	2.—
17486	P. Meulenbeld (Amstd.)	guld	1.50
17858	Schwartz (Den Haag)	mk.g.	1.35
11761	k gejunuloj	mk.g.	6.50
13943	G. Stein (Dresden)	mk.g.	2.50
11015	F. Rosengren (Stockh.)	kr.sv.	5.—
15976	J. Preker (Amsterdam)	guld.	1.50
16062	St. Rostoniec (Warszawa)	zlt.	3.—
135	Schinkel (Leipzig)	mk.g.	2.50
12929, 14450, 12427, 17523	el Polio	zlt.	3.50

ALARMO EN GERMANIO.

1932. Dimanĉon la 13. 3. je la 19a ni kunvenos. Ĉi-foje mi ne ricevis ordonon esti ĉe la kunvenejo 1 aŭ 2 aŭ 3. En ĉambrego ni kolektiĝos k atendos plurajn K-dojn.

Akurate mi alvenas k konstatas kun miro, ke ĉiuj K-doj el mia taĉmento jam ĉeestas, entute ĉ. 30 viroj en la aĝo de 20—30 jaroj. Preskaŭ ĉiuj fumas cigaredojn aŭ malmultekostan tabakon el pipeto. La aero estas tre malpura; miaj okuloj ekdoloras.


Kelkaj kartludas. La plimulto diskutas pri la rezulto de la baloto en la plej proksima voĉdonejo. En apuda ĉambro oni instalas akceptilon. Baldaŭ ni ekscios, kiel voĉdonis la popolo en la grandurboj.

Ĉu la faĉistoj ekagos hodiaŭ nokte? Tio estas la ĉefa temo. Ni scias, ke la Hitleranoj, junaj, ardaj proletoj samkiel ni, estas koncentritaj en k ĉirkaŭ la urboj. Ankaŭ ili febre atendas kiel decidis la popolo.

„Halo!" La komandanto ordonas al mi, vesti min k poste anstataŭi la gardostaranton, kiu troviĝas 300 metrojn de ĉi tie ĉe stratkruciĝo. Nun mi tie promenas. Multon oni ne povas observi. La tuta milita ludado taŭgas nur, por imagigi al la junuloj, ke ili ludas gravan rolon. Samcele oni rapidigas ku-

rierojn de unu gardejo al alia aŭ komisias fervorulojn iri kiel eble plej proksimen de faŝista kolektejo k tie observi la konduton de niaj erarigitaj samklasanoj.

Ne nur ni, la respublikanoj k la faŝistoj, estas pretaj hodiaŭ nokte. Ankaŭ la komunistoj ne dormos ĝis morgaŭ matene. Ilia partio ja nomigis propran kandidaton k eĉ ni ne dubas, ke multaj milionoj eprimis sian fidon al la sola reprezentanto de la proleta klaso. Ni trovis konsilinde voĉdoni por Hindenburg, la sola aspiranto, kiu havas ŝancon ricevi pli da voĉoj ol Hitler.



ADOLF HITLER

Ties propagandistoj kategorie alkriis la popolon: Hitler fariĝos prezidanto! Fakte per tia sugestado multaj, tro multaj estis instigataj elekti la komedianton, kiu promesas ĉion ajn al ĉiu. En periodoj de epidemioj la homoj emas kredi al sorĉkuracistoj — nun dum la ekonomia malprospero ili sopiras esti feliĉigitaj de heroo ...

Mian pensadon ĝenas la K-do, kiu anstataŭos min ĉi tie. Ni ŝanĝas kelkajn vortojn, dum li ŝtopas tabakon en sian pipeton. Moke mi deziras al li multe da plezuro k rapidas for.

En la ĉambro la aero ne pliboniĝis intertempe. Nun preskaŭ ĉiuj tenas kartojn en la mano k ludas „skaton". Kelkaj movas ŝakfigurojn. Dirinte al la komandanto, ke mi rimarkis nenion suspektindan, mi rigardas bildojn de ilustrita gazeto laborista, kiu estas eldonata en Aŭstrio, sed multe legata ankaŭ de germanaj socialdemokratoj, ĉar ni ne havas propran ilustritan organon popularan. De tempo al tempo alvenas K-do, kiu tenas enmane paperon. Li sciigas al ni la partajn rezultojn, kiujn dissendis la radiostacioj.

Je la dua horo ni certiĝis, ke Hindenburg havas plej multe da voĉoj, 49,6% voĉdonis por li. Bedaŭrinde necesas baloti duan fojon pro manko de la 0,4% al la absoluta plimulto. Do, la 10-an de aprilo ree ĉiuj estos pretaj: faŝistoj, respublikanoj, komunistoj, polico k armeo.

Ni ĝojas, ke Hitler ne venkis. Tiom modestaj ni estas! Ĉu iam 18 milionoj voĉdonos por laborista kandidato? Ni devos voĉdoni duan fojon por la eksgeneralo Hindenburg. Multaj ĝemas k bedaŭre levas la ŝultrojn.

Dume aperas kurieroj, kiuj bicikle vizitas aliajn grupojn. Ili kunportas novaĵon: la faŝistoj seniluziigitaj moviĝas hejmen. Oni rakontas, ke ne nur virinoj histerie ekploris, kiam estis certe, ke Hitler ne havas ŝancojn fariĝi prezidanto. Malbonhumore la atak-taĉmentoj nacisocialistaj cerbumas pri la malfavoro de la sorto. La ĵurnaloj konsolos ilin, promesonte, ke la faŝismo ekregos en aprilo aŭ majo, kiam ree okazos balotoj. Kompatindaj klasfratoj! Ankaŭ ni ne ripozos ĝis tiam!

Ŝufoman.

Generalo murdita.

La ĵus de sia filo murdita direktoro de Sveda Labordonanta Unuiĝo, *fon Sidof* (von Sydow), diris en la venkebrio post la ĝenerala striko de l'jaro 1909, ke li volas lernigi la svedajn laboristojn vivi sen kolumo. Tio estis promeso, al kiu li dum sia tuta vivo restis fidela. Se li estus havinta sufiĉan potencon, li ankaŭ igus ilin iri sen vestoj.

Lia vivo estis direktata al unu tasko — kiu faris lian grandon — nome rabi de l'laboranta popolo la plej multon el tio, kion ĝi produktis. Li estis ĉefo de entrepreno, kies tuta ekzisto estas bazita sur tio: malaltigi la vivnivelon de l'laboristoj k altigi la senlaboran enspezon de l'posedanta klaso. Se oni hodiaŭ rigardas la tragikan sorton, kiu trafis lin per perforta krimo de lia propra filo, oni ne povas ne demandi sin: kiom da familiaj tragedioj estis rezultoj de lia agado? En kiom da hejmoj mizero eniris kun sufero k malespero pro lokaŭt-proklamoj k salajrmalaltigoj de l'Sveda Labordonanta Unuiĝo? Certe ili ne estis malmultaj.

Kiam la gazetoj nun lamentadas pri tiu sanga krimo, la pensoj aŭtomate reiras al la ĝenerala striko de 1909. En tiu jaro la sveda laboristaro faris la plej grandiozan manifestacion ĝisnunan, k tiam estis farata al ĝi la plej granda perfido. Ne estis la malvenko kiel tia, kiu estis plej forta bato, sed la sekvoj akompanantaj ĝin. Kiu ne memoras, kiel la fieraj k memkonsciaj sindikatoj k fak-unuiĝoj, nevenkeblaj en sia fido al la interna solidaro, k antaŭ ĉio fidantaj al sia nelimigita sendependeco, fakte ruiniĝis, por poste esti rekonstruataj sur bazo de nelimigita, aŭtoritata potenco de gvidantoj. La tramistoj en Stokholmo, kiuj fieris pro sia 99-pocenta organizado k 100-pocenta solidaro, vidis sian organizon batitan en ruinojn. Ĉiuspeca aĉularo prenis iliajn lokojn sur la peronoj de la trajnoj. Multaj, eĉ pli aĝaj tramistoj, devis forlasi la landon k tion devis fari miloj da laboristoj el ĉiuj industrioj. La skribanto de ĉi tiuj linioj devis, pro la reĝimo de *Sidof*, elmigri kune kun miloj da svedaj laboristoj.

Unu K-don mi precipe memoras, admirindan tipon. Li persiste batalis dum la tuta striko, li amis sian hejmlokon k sian laboron, sed devis elmigri. Post tri monatoj en la nova lando li mortigis sin per revolvera kuglo. Li estis nur unu el la viktimoj de l'Sidofa reĝimo. Lia nura aspiro estis produkti valorojn por la homaro k el tiuj produktoj ricevi por si mem sufiĉe por modeste vivi. Kiam tio estis neebla k kiam li vidis, ke la organizoj fariĝis ludpilkoj en la manoj de l'gvidantoj, anstataŭ esti bataliloj en la servo de l'proleta klaso, li forlasis la vivon k neniu skribis lian nekrologon.

Jen, oni malŝparis tiom da vortoj k klopodoj por „edukado" de l'laboristoj, k precipe sinjoroj, kiel Sidof, estis agemaj tiurilate. Oni preparis lecionojn por la gepatroj el la laborista tendaro, priparolis, kiel ili devus eduki siajn infanojn al modero k kontentiĝemo k precipe al obeemo kontraŭ superuloj. Kaj dio gardu, kiel kriaĉas la „eduka gazetaro", se perfortoj okazas ĉe la tavolo el mizeruloj k proletoj.

Sed, kiel vi, sinjoroj popoledukistoj, edukas viajn infanojn!? Certe vi estas tiom okupataj por formuli admonojn pri kontentiĝemo, ŝparemo, moderemo ktp al laboristaj infanoj, ke eĉ ne unu momento restas al vi por enplanti tiujn virtojn ĉe via propra idaro. Kaj tio eĉ ne necesas. Per laborista ŝparemo k sindono restas tiom pli al la infanoj de l'supera klaso por malŝpari! Ili povas sin turnaĉi en lukso k diboĉoj. La tuta celado, kiun havas la agado de l'Sveda Labordonanta Unuiĝo, estas forrabi de l'laboranta popolo la fruktojn de ĝia laboro, por ke la mastroj kun siaj familioj povu ilin ĝui. Estas stranga ironio de l'sorto, ke la lasta ago, kiun faris Sidof en la flame amata Labora Juĝejo, estis verdikte forrabi perlaboritan salajron, kelkajn centojn da kronoj, de malriĉa maristo. Ĝis sia lasta spiro Sidof estis „socikonservanta forto", — forto por konservo de l' kapitalistaj rabmetodoj.

Ni ne malamas la memoron pri Sidof. Li estis nur ĉenero en la granda ĉeno, kiu ligas la laboristaron al sklaveco. Kiam tiu ĉenero malfortiĝis, ĝi estis anstataŭata per alia, pli forta. Sed ni malamas tiun inerton, tiun mankon de kuraĝo, de agemo, kiu depost „la granda striko" signas la vojon de la sveda laborista movado.

El *Arbetar Kuriren*, sveda sindikatista gazeto trad. *Norman (13 132)*.

Por ke „LA NOVA EPOKO" pluvivu

Iu el Bulgario *fr.fr. 4.50*

El Polio.

Polio, kiel lando troviĝanta apud Sovetio, havas specialan atenton de l' burĝaro, kiu timegas „orientajn blovojn". Tiu tim-atento speciale pligrandiĝis en la nuna kriza tempo. La sanga registaro de Pilsudski provas per la iamaj caraj rimedoj sufoki ĉiujn signojn de ribelo. Laste oni eldonis dekreton, laŭ kiu politikaj malliberuloj estas samrajtaj kun la t.n. „krimuloj". Estis publikigita nova lernej-leĝaro, laŭ kiu la lerntempo en popollernejoj estas malplilongigita k la gimnaziojn povos viziti nur speciale „kapablaj" gejunuloj. Krome oni ricevos tie ŝtatan (faŝistpatriotan) edukon. La registaro provokis kontraŭsemitajn elpaŝojn (oficiale ĝi kontraŭstaris tion!), esperante ankaŭ altiri la laboristojn k tiel ilin malpacigi. Sed estis iluzio, ĉar la laboristoj formis unu fronton kun la atakitoj kontraŭ la atakantoj.

Samtempe la burĝaro volas ĵeti la sekvojn de l'ekonomia krizo sur la ŝultrojn de l'laboristaro. La registaro provis oficiale plilongigi la labortempon k forrabi ĉiujn sociajn asekurojn, kiel ŝtatsubvencion por senlaboruloj (kvankam nur 1/5 el la tuta senlaborularo ĝin ricevas) k malsanul-kason. Nur la energia kontraŭstaro de l'laboristaro devigis ĝin retiri tiun decidon. La tramdirekcio de Varsovio provis redukti la salajrojn; la tramistoj respondis per kelksemajna striko, dum kiu ili elmontris neviditan ĝis nun solidaron. Sekvis tramista striko en Lodz, kiu malgraŭ 13-taga heroa batalo fiaskis. Menciinde estas, ke la socialista magistrato en Lodz havas 33% da akcioj en la tramdirekcio k ĝi ne donis eĉ al la strikantoj eblon kunveni.

Jam pli ol monaton daŭras la t.n. „itala striko" de 1000 laboristoj en metalfandejo „Hortensja". Dum la tuta tempo la laboristoj ne forlasas la laborejon k la parencaro portas al ili nutraĵon. Ĉiutage pli multaj el ili malfortiĝas k svenas. La ceteraj tamen restas kantante revoluciajn kantojn.

Lastatempe polaj „karbbaronoj" volis redukti la salajrojn je 30%. Dume la registara arbitraci-komisiono proponis 8%-an salajr-malaltigon. La laboristoj rifuzis k la 14-an de marto eksplodis striko de 40 mil karbministoj, kiu ankoraŭ daŭras ĝis nun. Okazis multaj interpuŝiĝoj kun la policistaro. Estas jam 4 mortigitoj k multaj vunditaj laboristoj. Specialan heroecon elmontris de l'policistoj atakitaj edzinoj de la strikantoj. Ĝis la lasta momento social-demokrataj gvidantoj ne deziris la strikon, k kiam iliaj anoj elektis proprajn strik-komisionojn, ili volis transformi la strikon en unutagan protest-esprimon.

Laste la registaro fondis komitatojn por helpi al senlaboruloj ne ricevantaj ŝtatan subvencion por tiel fortiri la atenton de l'vera kulpulo. Tiuj komitatoj monkolektas k donas al senlaboruloj, konataj kiel neribelemaj, ĉiutage akvosupojn. La soc-dem. partioj oficiale en siaj organoj alvokas bojkoti tiujn komitatojn, sed iliaj gvidantoj kunlaboras en ili kun episkopoj k grandindustriistoj.

La lastaj okazintaĵoj en Polio pli konsciigas la laboristaron ol plej belaj teorioj k oni povas observi pliradikaliĝon de l'laborul-amasoj.

„Iu" el Polio.

Nova politika partio en Nederlando.

Nova politika partio estas fondita je la 28-a de aprilo en Harlemo (Nederlando). La membroj de ĉi tiu partio apartenis al la opozicia grupo en la Socialdemokrata Lab. Partio (S.D.A.P.). La opoziciuloj forlasis ĉi lastan dum la paska kongreso de S.D.A.P., ĉar estis akceptata rezolucio, kiu forprenis de la opoziciuloj ĉiujn iliajn rajtojn.

La nova partio estas nomita „Sendependa socialisma partio" (O.S.P.) k ĝia programo k batalmetodoj estos pli revoluciaj ol tiuj de la „granda" S.D.A.P.

Do, denove SAT enhavas membrojn de nova politika partio, ĉar mi scias, ke multaj nederlandaj SAT-anoj aliĝis al la nova O.S.P. Kaj kvankam ree la nederlandaj laboristoj estas dividitaj, ni ĉiuj restas klasbatalaj esperantistoj, ni ĉiuj restas k trovas lokon en la SAT-tendaro.[1]

Bas Wels (17 668).

El Britio.

Hodiaŭ estas en Britio 540 milionuloj. Tio estas 21 pli ol en la lasta jaro (1931). Oni kalkulas anglan milionon laŭ funtoj sterlingaj (1 funto = ĉ. 4 dolaroj). 157 el tiuj homoj gajnas ne malpli ol 100 mil funtojn jare, aŭ 2 000 ft. semajne. Ĉiuj ricevas almenaŭ 50 mil funtojn jare, aŭ 1000 ft. semajne.

Dum la nombro da parazitoj kreskas, la kvanto da senlaboruloj ankaŭ pliiĝas. La kapitalistaj ĵurnaloj diras, ke la nombro da *enskribitaj* senlaboruloj malkreskas, dank' al la nova registaro; sed ili ne diras, ke la kialo estas, ĉar iliaj nomoj estas forstrekitaj pro la „vivrimeda provo" (angle: means test). Laŭ statistiko la nombro da tiaj viktimoj estas 1 884 074.

Laŭ „Ĉiutaga Laboristo" al 40-jara viro, kiu estis senlabora k ricevis subvencion, oni ĉesis pagi tiun subvencion, pro tio ke lia maljuna patrino laboris. Tio signifas, ke por daŭrigi la rentopagojn al supre nomitaj parazitoj, unu miliono da laboristoj ricevas malpli multe da subvencio, aŭ tute nenion.

[1] Jen nova fakto, kiu apogas la tezon de K-do E. Lanti en lia III-a Letero. (Komp. la n-on 381 de „S-ulo").

En ĉiuj kapitalistaj landoj malriĉo k mizero kreskas. Dum kiom da tempo ankoraŭ oni toleros tion?!

M. Sampson.

La reakcio organiziĝas en Estonio.

Estonaj grandbienuloj, kiujn la nuna ekonomia krizo forte premas, deziras plibonigi sian staton je la kosto de l' laboristaro k oficistaro. Ĉiujn bienojn premas la ŝuldoŝarĝo al ŝtataj bankoj. Pro tio la bienuloj postulas, ke la kurzo de l'estona krono estu malaltigata, por ke ili povu pli facile pagi siajn ŝuldojn; aŭ – la registaro donu al ili longdaŭran *moratorion* (pagprokraston). Por efektivigi siajn celojn, la du agraraj partioj kuniĝis k devigis la registaron sin reorganizi, tiel ke la reakciulaj postuloj en ĝi estas pli multe subtenataj.

Krom sia ŝuldomalŝarĝo ili ankoraŭ postulas, ke la salajroj de ĉiuj ŝtatoficistoj estu reduktataj je 30–40%. Popolinstruistoj estu maldungataj, oni redungu ilin laŭ – plej malaltaj sinproponoj: kiu el la instruistoj konsentos labori laŭ plej malalta salajro, tiu estu redungota. Senlaborulojn oni sendu al la vilaĝoj, kie ili senpage laboru por helpi la bienulojn: la ŝtato pagu al ili monatan salajron de 5–8 kronoj! Sekve – oni oferu ĉion, nur por helpi la bienegulojn!

La mizero inter la oficistaro jam nun estas grandega; pro tro etaj salajroj oni ofte en mizero misuzas al ili disponitan monon k poste ili estas kondamnataj al multjara malliberigo. Kelkfoje oni mortigas sian kolegon nur por forrabi liajn kelkdek kronojn, por plibonigi sian propran mizeran staton! Ĝis tie kondukas morale la homaron la nuna kapitalisma ordo!

En la tuta lando la salajroj de l'industriaj laboristoj estas reduktataj de 5–20%. Eĉ la salajroj de l'tipografiistoj malaltiĝis, kvankam ili ĝis nun, dank' al sia forta organizo k bonsukcesaj strikoj, havis pli bonan staton ol aliaj laboristoj.

Laŭ oficiala statistiko troviĝas inter la senlaboruloj 25% da junaj viroj k 50,4% da junaj virinoj, kiuj ĝis sia 30-a vivjaro povis trovi nenian laboron. Inter ili estas 30% da viroj k 63% da virinoj, kiuj havas pli altan klerogradon ol popollernejan.

N. Ruus (15 428).

Ĵus aperis ĉe SAT
UNUA LEGOLIBRO
104 paĝ. Riĉe ilustrita. Kun multaj lingvaj klarigoj k rimarkoj. *Prezo: 1,— mk.g.*
Administrejo de SAT, Kolmstr. 1, Leipzig O. 27.

La klasbatalo tra la mondo

La striko de l'nederl. tekslaboristoj finiĝis.

La striko, pri kiu vi legis en „S-ulo" n-o 384, bedaŭrinde finiĝis per malvenko de la tekslaboristoj. Jam kelkfoje la estraroj de la katolika k protestanta fakunuiĝoj sekrete intertraktis kun la fabrikposedantoj por trovi rimedojn fini la strikon. Subite, antaŭ pasko, la du nomitaj unuiĝoj publikigis sian decidon akcepti la kondiĉojn de l'„labordonantoj". Voĉdonado inter la anoj laŭ tiuj estraroj ne necesis; ili simple devigis ilin eniri la fabrikojn, ĉar tiuj, kiuj ne obeus la „lab. gvidantojn", ne plu ricevus strikant-subtenon!

Ĉu la kondiĉoj estas akcepteblaj? La mastroj proponis tujan malaltigon de l' salajro je 5%, k ankoraŭ je 5% post kelkaj semajnoj. Ĝuste kontraŭ tiuj malaltigoj ekstrikis la gelaboristoj je la 14. dec. 1931! La revolucia social. unuiĝo tuj proponis al la social-demokrata unuiĝo kunlaboradon k daŭrigon de la striko, ĉar montriĝis, ke multaj kristanaj laboristoj rifuzos rekomenci la laboron tiakondiĉe. La revol. soc. unuiĝo proponis ankaŭ al la soc.demokrata rezervi e! la ricevota mono 10% por pagi el ĝi al la strikantoj, ne-anoj de la du organizoj, por ke la striko daŭru. La soc. dem. organizo ne respondis; ĝi publikigis, ke ne plu eblas daŭrigi la strikon k konsilis al siaj anoj rekomenci la laboron! Jam depost la 4-a de aprilo la fabrikoj refunkcias. *16 458.*

Sanga striko en la ĉeĥoslovaka minregiono.

Fine de marto eksplodis striko pro la salajraj malpliigoj, kiu etendiĝis trans la tutan ĉeĥoslovakan minregionon; en la Bruksa distrikto la striko estis ĝenerala; en Ostrovo estis pli ol 7000 strikantoj; ankaŭ al la Kladnoa regiono transportiĝis la movado. En Ostrovo okazis sangaj kunpuŝiĝoj kun la ĝendarmoj, kiuj pafis kontraŭ la laboristojn k mortigis unu, dum ses aliaj estis grave vunditaj. *Ro.*

El Francio.

En Fuĵer (Fougères), centro de ŝufabrikado, la laboristaro batalas depost multaj semajnoj kontraŭ la malpliigo de l'salajroj proponitaj de la entreprenistoj. Estas 8000 strikantoj, subtenataj de siaj sindikatoj (*Konfederacio Ĝenerala de Laboro* [C.G.T.] k *Konfederacio Ĝen. de Laboro Unueca* [C.G.T.U.]). La policistaro, en la servo de l'mastroj, atakis brutece la strikantojn k precipe la virinojn. La batalantoj kvankam elĉerpitaj pro la longa daŭro de l'batalo, esperas povi venki, kalkulante je la solidaro de l'aliindustriaj laboristoj. S.

Sukcesoj de l'eklezioj en Germanio.

Al dekreto „pro danĝero" de politika paco de 20. 3. ĝis 3. 4. la registaro aldonis la ordonon, ke estonte ĉiuj flugfolioj estu prezentotaj al polico, ankaŭ tiuj disdonotaj en loĝejoj. (Ĝis nun tio validis nur por tiaj, destinitaj al disdono sur publikaj stratoj k placoj.) La polico nun povas malebligi la disdonon de ĉiaj flugfolioj, ĉu politikaj, ĉu liberpensulaj (la dekstre politikajn ĝi certe ja ne malhelpos). *16900.*

La Komerca Komitato de l'prusia parlamento decidis (la 17. 3.) peti la ministraron, ke ĝi ordonu jenon: La religia instruo estu regula instrufako en la metilernejoj tie, kie jam ekzistas tia instruo laŭ decido de l'koncernaj instancoj. Tio signifas: Ĉe la koncernaj metilernejoj la religia instruo nun estas deviga fako. Kiu ne volas partopreni, tiu devas fari specialan anoncon pri eksiĝo. Ne tre granda, tamen grava sukceso de l'katolikoj. (Komparu „S-ulo"-n n-o 383.) *16900.*

El Italio.

Laŭ statistiko de l'31. januaro estis ĉi tie 1 051 321 senlaboruloj, el kiuj nur 254 000 ricevas malgrandan subvencion tri tagojn semajne kun limtempo. En decembro 1931 la nombro da senlaboruloj estis 593 000, sekve la senlaboreco duobliĝis de unu jaro al la alia. La malfeliĉego trafas precipe la nord-italajn laboristojn.

Laŭ „La Liberecano" (Le Libertaire).

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

La pripacaj intertraktoj por reguligi la Ekstrem-Orientan problemon (Ŝanĥajo, Manĉurio) nur pene progresis; Japanio minacas daŭre eksiĝi el la Ligo de Nacioj, se ĝi ne ricevos kontentigon. Ĉinaj patriotoj rekomencis milit-agadon en Manĉurio kontraŭ la tie restintaj japanaj trupoj k kontraŭ la sub japana premo kreita „sendependa" manĉuria registaro.

La brita registaro estas malkvieta pri la necedema sinteno de la *irlanda* respublikano De Valera, venkinto en la lastaj balotoj, kiu rifuzas fideldeklaron al la angla reĝo.

La prusia intern-ministro *Severing* (socialdemokrato) faris ĝeneralan atakon kontraŭ la naci-socialistoj (Hitler), malpermesante iliajn gazetojn ktp. La naciista regna intern-ministro *Grener* (Groener) provis malhelpi tiun faron de sia kolego k preskaŭ malkaŝe protektas la Hitleranojn.

Dum du semajnoj daŭris registare dekretita „politika batalhalto" en Germanio; dum tiu periodo ne povis okazi manifestacioj nek politikaj paroladoj, agitado ktp. Post ĝia finiĝo la elektobatalo reekfuriozis.

La sinmortigo de Ivar Kreŭger, gvidanto de l'tutmonda alumeta trusto, pro malbonaj negocoj, je 12. III. en Parizo, alarmis la tutmondan financistaron. Ĝi montras la senelirejan situacion de l'kapitalismo. Preskaŭ samtempe sin mortigis la „reĝo" de l'foto-industrio *Istmen* (Eastman) en Usono.

En ekzilo (Parizo) mortis je 29. III. unu el la plej distingaj gvidantoj de la itala socialista movado, Filipo *Turati*. Li estis deputito de Milano de 1895–1926 k staris sur la dekstra alo de la socialista partio. La Pariza socialistaro kune kun la elmigrintoj el Italio faris al lia kadavro grandiozan enterigan ceremonion.

La Sovetia registaro varbas kompetentulojn por kun ilia helpo starigi la gvidliniojn k nombrojn por la *Dua kvinjarplano* antaŭ la fino de tiu ĉi jaro.

La supera tribunalo en Moskvo mortkondamnis Stern k Vasiljev kiel aŭtorojn de la pro politikaj motivoj farita atenco kontraŭ germana ambasadorkonsilanto Tvardovski.

La unua konkreta provo solvi la planon, iniciatitan de la franca registaro, pri *Danublanda ŝtatar-konfederacio* (renkontiĝo de 4 ŝtatreprezentantoj en Londono) fiaskis. Germanio k Italio konsideras tion kiel diplomatan sukceson.

Per *dua* balot-iro (10. 4.) *Hindenburg* estas (re)elektita regna prezidanto de Germanio. Li ricevis la absolutan plimulton da voĉoj — 53% (je la 13. 3. 32. — 49,6%). Hitler ricevis 37% (kontraŭ 30,1% je 13. 3.), Telman (kom.) 10% (kontraŭ 13,1%).

Malarmado . . .

La blindulo interplektis la manojn, k rigardante en la nenion, li parolis: „Mi ne scias, ĉu inter la centoj da reprezentantoj ĉe ĉi tiu konferenco estas unu reprezentanto de tiuj milionoj, kies juno k kies forto kiel la mia estis detruataj per unu kuglo, per unu grenada splito, per unu venengasa nubo!?"

„Mi ne scias, ĉu dum la paroladoj oni pensos momenton pri la homruinoj, kiuj depost 1918 nenion plu rajtas atendi, escepte iom da kompato!?

„Tion ĉion mi ne scias, sed mi scias, ĉu nia sindono estos vane donita, ĉu la voĉo de la homeco denove sufokiĝos en la militbruo, ĉu la nun kunestantaj delegitoj el ĉiuj landoj de la mondo ne forprenos la minacon de la mortdanĝero de ni; tiam premos sur Ĝenevon la malbeno de ni ... ni kripluloj, blinduloj, frenezuloj, lamuloj ... tiam premos sur la tutan mondon la malbeno de senkulpa sango, kiu nun post dek kvar jaroj ankoraŭ kulpigas k akuzas la mondon."

*

„Ha ha ha!" ruliĝas laŭte la rido de Marso tra la mondo k jam atingis Ĝenevon.

„Ha ha ha! packonferenco, ridinde! Ridi mi devas vidante vin, miajn plej fidindajn disĉiplojn kiel delegitojn!

„Ĉu vere per vi la mondo kredas krei pacon daŭran??" ha ha ha! ...

„Kiel fidela vi estas al mi, panjo Tero, vi bone scias, ke vi ne povas malhavi militon. La vekrioj de orfoj k orfidoj ne tuŝas nin, kiam ni komercas per militiloj.

„Bona komerco, la militkomerco, ĉu ne? Jes, nin, Marson k Teron, malnovajn geamikojn, oni ne povas disigi.

„Komence mi timis, ke oni estus sendintaj militviktimojn al tiu konferenco, sed vidante miajn proprajn idojn tie, mi jam ne plu timas, ... aŭ ĉu ili ne plu restos fidelaj al mi k klopodos krei pacon?! ...

„Sed kial mi do timu? en la oriento jam denove la ludo komenciĝis.

„Paco? ... Kripluloj, orfoj, plendantaj patrinoj! mi, Marso, ne timas vin. Ha ha ha!!" *A. E. 15 700.*

SENNACIULA PEDAGOGIA PAĜO

Redakcia adreso; K-do Simon Aarse, Veeteeltstrato 63, Amsterdam (Holando).

LA SOVETIA LERNEJO.

Por esti tre klara, mi devas kompari burĝan k sovetian lernejojn. La burĝa lernejaro, precipe la neŭtrala, publika, estas kreo de la pli frue revoluciema burĝa klaso, sekve estas regata de ĝia ideologio. Ĝia ĝenerala karaktero estas difinata de la burĝaj moralo k historio-filozofio.

Tio montriĝas en diversaj fakoj, en la naturscienca instruado, la dorlotata temo de l'burĝaro, en la karaktero de l'historia lernigado, en kiu mankas la historio pri la proletaro k kiu konsistas el glorigo k famigo de „herooj“ antaŭbatalantaj por idealoj de l'kapitalismo.

La praktika kalkulado reguliĝas laŭ la bezonoj de l'kapitalisma socio. Entute la lernejo estas dependa de la socio, ĉar post la lernado multaj devas trovi ĉelon en la granda ĥaosa abelujo k kiel proletoj ili estas helpataj sole de la postulataj konoj.

Malgraŭ la fakto, ke la socio difinas la lernejon en la kapitalismaj landoj, la firma k malvasta ligilo inter socio k lernejo mankas, la lernejo formas apartan mondeton, kiu eĉ povas evolui iomagrade sendepende de la socio; la infanoj eĉ lernas konojn ne rekte postulatajn de la socio. La etulojn oni laborigas laŭ la deviga moralo; ne estas granda principo, kiu ligas la diversajn fakojn, k kiam la juna homo eniras la socion, ĝi staras antaŭ nekonata aperaĵo, paŝas en fremdan mondon.

*

Principo, aranĝo k bazo de l'sovetia lernejo tute diferencas de l'burĝa, ĉar ĝi estas firme k fikse ligita al la socio. La infanoj trapasante la lernejon kreskas nerimarkite en la vivon; socio k lernejo kunfandiĝis. En la sovetia socio ĉio estas regata de l'proleta klaso, la moralo, la historikoncepto, la filozofio, la scienco; ĉio radikas en la klasaj interesoj de l'laboristaro.

La infanoj ne estas laborigataj pro socia devo: akiri kiel eble plej baldaŭ bonan individuan pozicion; ili ne ellernas diversajn fakojn sen interligo, ili ne ricevas iom da abstrakta scio, dum mankas la pluaj sociaj instigoj k rilatoj por apliki ĝin. Tuj ekde la kvara jaro ili lernas plenumi socian taskon, en tia formo, ke ili faras ĝin plezure, eksciante samtempe, ke ilia tasketo estas parto de granda tuto k ke ili estas utilaj al la tuto farante etan laboron.

Oni pasie instigas al laboro per la kvinjarplano, por pli bona socio, samtempe en pluaj jaroj kondukante la infanojn al mondkoncepto, al internaciismo, al komunismo, sub gvido de la dialektika materialismo ellaborita de Lenin. Tio sonas strange al alies oreloj, sed niaj kolegoj ne forgesu, ke la revolucia ŝanĝo de la socio ankaŭ evoluigis forte la infan-animojn. Tio montriĝas precipe per la trafa ateismo, kiu tuŝas ankaŭ infanojn ne atingitajn de la bolŝevika propagando (kio montriĝas el la malŝato, precipe ĉe knabinoj, kontraŭ la formo de familio k kontraŭ mastrumado.)

La sovetiaj infanoj estas pli konsciaj eĉ ol malprogresemaj gepatroj.

*



En la sovetia lernejo oni ja parolas pri bildoj, sed oni starigas la infanaron meze en la vivon. Ekzemple la lernejo aranĝas la purigadon de semeroj k montras ekspozicie la diferencon inter bonaj k malbonaj plantoj; la infanoj devas desegni la ĝardenon k daŭre noti la kreskadon de la plantoj. Ili faras librojn, kunmetante ilin el gazetaj bildoj k fine ili konstruas desegne la kvinjarplanon.

Ĉiam oni montras k komprenigas la laboron kiel eron el la tuto. Oni gvidas la instruadon laŭ la vortoj de Lenin, ke ĉiutage en ĉiu urbo, en ĉiu vilaĝo la junularo plenumu faron por konstruado de la lando, se eĉ nur la plej etan, malgravan. La tre junaj infanoj kolektas malnovan feraĵon por aĉetigi traktoron aŭ ebligi la aĉeton, ili aranĝas kokinejon, faras statistikon pri la ovoj, prizorgas la nutradon, purigas la manĝujojn ktp.

En la urboj ekzistas densa ligilo inter fabriko k lernejo k en la pli altaj klasoj la infanoj jam formiĝas kiel laboristoj, lernas la teknikon k ekkutimiĝas pri fabrikmedio. Lenin pri la instruado ĉiam diris: Ni bezonas tri aferojn — lerni, denove lerni k triafoje lerni.

Laŭ tiuj vortoj la edukado ampleksas ne nur la infanojn, sed ankaŭ plenaĝulojn. Ĉi tie montriĝas la bona racio de la registaro, kiu utiligas la infanojn por eduki la pli aĝajn, sciante, ke novaj ideoj pli bone estas akceptataj de la junularo. Kaj tiam oni vidas la por ni strangan bildon, ke infanoj riproĉas al gepatroj, ke junuloj klarigas murgazetojn k instruas la legadon.

Pro tio la lernejo estas firme ligita al la fabriko, la vere politika centro; ĝi rilatas kun partio, pioniroj, junularmovado k gepatroj. La lernejo mem estas dividita laŭ grupoj, kiuj aranĝas aparte la mastrumadon, higienon, kulturon (bibliotekon) k gazetaron.

*

Eble oni sin demandas, ĉu la sovetiaj infanoj ne tro peze laboras, ĉu ili ne estas maljunaj infanoj, kiuj parolas kiel saĝuletoj k perdis ĉion infanan. Kiuj vidis ilin, tiuj kontraŭdiras tion: la infanoj montras multe da gajo, serioze, sed ĝoje laboras k kun feliĉo ili vizitas la lernejon, ludas k kondutas kiel infanoj, spontanee, libere k sen troigoj. Ĉiu okazo estas ekspluatata de la registaro kiel laborobjekto, ankaŭ la festotagoj k la ferio. Post la ferio la etuloj devas fari verketon pri siaj travivaĵoj k samtempe ili lernas kanton:

„La kuriero. — De l'Uralo k Donbaseno, de l'Kaŭkazo k de Ukrainio, li kuregis, la kuriero, la delegitaro de la atakbrigadoj ... Ĉiu el ili estas en gaja k alta animstato, ĉiu ĝojas povi mencii al la konferenco raporton pri sia laboro. Ili estas niaj gvidantoj, ili estas bolŝevikoj. — La antenoj al ni diris tion, rakontis pri la kreskado de ĉiu urbo, de ĉiu tekniklernejo, rakontis kiel rapidas nun la rimenoj k motoroj, rapidas nun ĉies mano ...“

El tiu kanto sonas la ritmo de l'kvinjarplano, la tero skuiĝas, la aero tremetas, ĉio estas tuŝita de tiu pasia ritmo, batalo por pli bona socio, — ankaŭ la sovetia lernejo. Lenin mortis, sed lia spirito vivas.

S. A.

ĈIUJN

de vi bezonatajn esperantaĵojn, el kiu ajn eldonejo (librojn, broŝurojn, lernilojn ktp) vi povas mendi ĉe la

ADMINISTRACIO DE SAT,
Kolmstr. 1, Leipzig O. 27.

Notu bone tion en la memoron k neniam forgesu, ke aĉetante ekskluzive ĉe SAT vi tre efike helpas al ĝi por „ŝtopi la breĉon“!

TRA ESPERANTIO

Publikaj leteroj al multaj SAT-anoj.

VIII

Karaj K-doj,

vi diras, ke la granda plimulto da organizitaj laboristoj en la tuta mondo akceptas la marksismon kiel teorian bazon por sia klasbatalo. Nu, konsentite. Estas fakto, ke la anarkista, ISK-a, fiziokratia k.a. similaj movadoj ne havas grandan anaron. Ĉu pro tio oni prave povas diri, kiel vi, ke tiuj „sektoj estas tute malatentindaj“? Ĉu do vi forgesis, ke, rilate al teoriaj demandoj, la opinio de plimulto ne havas valoron? Scienca problemo estas konsiderata kiel solvita, nur kiam la fakuloj unuanime interkonsentas. Unu sola homo povas esti prava kontraŭ ĉiuj aliaj. Pri tio liveras la Historio sufiĉe da ekzemploj.

Sed provizore mi konsentu kun vi, ke la opinioj de Kropotkin, de Nelson aŭ de Gezel estas tute nekonsiderindaj; ke nur la marksismo liveras la „ĝustan bazon, sur kiu povas stariĝi firma unueco de la proletaj esperantistoj.“ Ni do momente supozu, ke la marksismo fariĝis kvazaŭ fortika digo, kontraŭ kiun ĉiuj aliaj ideofluoj disrompiĝas. Ĉu pro tio estus nia unueco tute sekurigita? Ne, certe ne! ...

Bonvolu, karaj K-doj, rigardi ĉirkaŭ vi kun tute malfermitaj okuloj. Ĉu do vi ne vidas, ke la marksistoj plej akre disputas inter si? Kaŭcki, Hilferding, Blum, Vandervelde, Baŭer, Dan, Abramoviĉ k.a. menŝevikoj ĵuras nur per la „Kapitalo“ de Marks; tamen la gvidantoj de la IIIa Internacio argumentas k plej draste asertas, ke nur la bolŝevikoj interpretas ĝuste la marksismon ... Sed plej signife: ĉe la anoj de Komintern mem ne regas interkonsento pri la doktrino. Trocki ja skribas milojn da paĝoj por pruvi, ke Stalin malĝuste komprenas k fuŝaplikas la „marksleninismajn“ instruojn. Kaj Stalin forpelas el Sovetio sian kontraŭulon k nomas lin „kontraŭrevoluciulo“.[1]

Tiuj okulfrapaj faktoj plej evidente pruvas, ke la oficiala agnosko al la marksismo fare de SAT ne kreus la necesan kondiĉon, kiu povas sekurigi la unuecon en nia movado. Kredu, ke mi sufiĉe longe cerbumis pri la demando. Por ebligi la kunlaboradon de la klasbatalaj esperantistoj el ĉiuj tendencoj, vane mi serĉis alian pli taŭgan bazon ol tiun, kiu kuŝas en nia Statuto: malakcepti ĉiun oficialan socipolitikan programon k permesi al ĉiu tendenco, ke ĝi esprimu sian propran vidpunkton laŭ konvena, neofenda maniero.

La fanatikuloj, kiuj ne volas toleri aliajn opiniojn ol la proprajn fakte ne estas funde konvinkitaj. Se ilia konvinko rezultus de tre serioza konsiderado, kial do ili timus kompari siajn tezojn kun tiuj de aliaj? Neniu serioza intelekta laboro estas ebla, se ni tuj forpuŝas ideon, kiun unuavide ni opinias erara. Se fakte ĝi estas tia, per ĝia ekzameno oni povas nur plifirmigi sian propran konvinkon. Aliparte, en kiu ajn ideo eĉ la plej evidente erara k al ni malplaĉa povas tamen troviĝi elementoj kapablaj ion instrui al ni.

Kaj se oni konsentas, ke la marksismo estas la *sole* vera, la *sole* taŭga doktrino por la proletaro, ĉu do tio signifas, ke ĝi devas esti trudata perforte? Ĉu ni restarigu la mezepokan inkvizicion k brulmortigu ĉiujn herezulojn? Aŭ ĉu ne pli taŭgas la metodo rekomendita en la SAT-Statuto, nome konvinki per rezonado, per klarigo pri faktoj k komparo de tezoj?

Kompreneble, kiam temas pri politika organizo, tiam estas tute alia afero. Laŭ mia kompreno, partio estas kvazaŭ armeo, estas batalorgano kun tute precize difinita celo: kapti balote aŭ revolucie la regadon en iu lando. Programo estas necesa por tia batalo k la partianoj devas obei al la decidoj de la estraro kiel militantoj al la ordonoj de armea stabo. Por venki en batalo la soldatoj kompreneble ne devas pridiskuti la ordonojn. La plej bona k perfekte ellaborita plano de kiu ajn stabo ne povas konduki al venko, se la plenumantoj ne agas discipline. Tio estas klara k ne diskutebla. Sed SAT ne celas konkeri la politikan povon en iu fantazia Esperantio; ĝi ne havas kiel taskon organizi k gvidi strikojn, sekve kial do ni imitaĉu partiojn?

Nia celo estas nur atingi, ke ĉiuj tiuj laboristaj organizoj alprenu k apliku esp-on, imite al la SAT-anoj. Ni faras pioniran laboron k liveras la bonan ekzemplon. Kaj kiam la laboristaj organizoj imitos la SAT-anojn, tiam nia organizo ne plu havos ekzistorajton. La malapero de SAT devas signifi la definitivan venkon de esp-o ĉe la laboristaj organizoj. Bedaŭrinde ne baldaŭ sonoros tiu horo. Por ĝin pliproksimigi, tre utilus la kunlaboro de ĉiuj tendencoj k nur la vidpunkto difinita en nia Statuto *ebligas* (mi ne diras: certigas, tial ke mi ne havas tiom favoran opinion pri la saĝo de l'homoj!) tiun kunlaboradon.

Karaj K-doj, se vi estas firme konvinkitaj pri la pravo de via vidpunkto, ne timu do ĝin kontraŭmeti al tiu de alipensantoj k ne forpuŝu ilin per ia ortodokso, per starigo de nediskutebla dogmo. Memoru, ke Marks mem iun tagon paradokse diris: „... mi ne estas marksisto ...“

Kun sendogmeca saluto de via *E. L.*

[1] Estas tute normala fakto, ke homoj ne povas interkonsenti pri tiaj demandoj, kiuj pli malpli estas metafizikaj. Kaj mi petas la legantojn pardoni jenan ekstertemaĵon: en ĉiuj religioj, kies dogmoj estas konigitaj de dio mem al la homoj, okazis skismoj pro malsama kompreno de la diaj diroj. Kio pruvas, ke dio tre malklare sin esprimis. Tian malklaron oni povas pardoni eĉ al iu geniulo, sed al dio? Tiu konstato ĉiam estis por mi unu el la plej fortaj pruvoj pri la neekzisto de dio.

Komuniko de la Direkcio.

Kiom malfacila nuntempe estas la funkciigado de tutmonda asocio, la K-doj povos prijuĝi laŭ jenaj faktoj. Hodiaŭ la ŝtatoj ĉiam pli k pli ĉirkaŭas sin per dikaj limoj, izolas sin unu de l'alia. La libera mon- k var-interŝanĝo estas haltigita aŭ treege malfaciligita, k tiel ekz. el Latvio oni tute ne povas sendi monon eksterlanden, nek el Aŭstrio, Hungario, Germanio, Estonio, Sovetio, Bulgario. Aliaj landoj eble sekvos per similaj dekretoj pri malpermeso eksporti monon.

Rilate la monon ricevitan de aŭstriaj K-doj ni jam trovis solvon, presiginte en Vieno la „Unua Legolibro“-n, kiu ĵus aperis; same la mono kolektata en Germanio povas esti eluzata tie, ĉar ni presigas gazeton, Jarlibron ktp en tiu lando. Sed eĉ la enportado de libroj ktp el la landoj, kie ili estis presitaj, en la landon, kie troviĝas la ekspedejo, estas elspeziga, ĉar la dogano prenas sian parton ...

Malgraŭ ĉiuj malfaciloj k malgraŭ la fakto, ke la b r e ĉ o ankoraŭ ne estas ŝtopita, la SAT-agado komencas denove pliviglĝi: reeldono en pli bela aspekto de „La Nova Epoko“, apero de nova Legolibro, de la Jarlibro, estas evidentaj signoj, ke SAT vivas k ne estas mortiĝanta ...

Tuj post elĉerpiĝo de la nuna eldono ankaŭ estos presata la nova „PETRO“, la ŝatata SAT-lernolibro, en pli granda amplekso, zorga reprilaboro k kompletigo, kun metoda ekzercaro k multaj ilustroj.

Kiom ajn malfavoraj estas la cirkonstancoj por disvolviĝo en la nuna kriza periodo, nia Asocio nevenkeble iros sian vojon. Gek-doj, varbu, varbadu tie, kie prezentiĝas ebloj! Precipe direktu vian atenton al la certigo de la ekzistobazo de „La Nova Epoko“, kiu bezonas 500 apartajn abonantojn por povi plue aperadi en la nuna formo! Antaŭen!

Pro manko de spaco en ĉi tiu n-o ni bedaŭrinde devas prokrasti la rubrikon RECENZEJO.

Financa Raporto pri la 11-a SAT-Kongreso.

Enspezoj		*Elspezoj*	
Kongreskotizoj	792.68	Salonluo	350.–
Subvencio de l'komunumo A'dam	300.–	Federacio de Lab. Esp.	350.–
Subteno de organizoj	395.–	Insignoj	65.10
Subteno per listoj	406.51	Poŝtkartoj ktp.	138.90
Poŝtkartoj ktp.	123.79	Filmo	72.–
		Kongreslibro	95.–
		Protokolaro	540.57
		Muziko	145.–
		Ĝeneralaj elspezoj	261.41
	Hol. gd. 2017.98		Hol. gd. 2017.98

Amsterdam, la 10. feb. 1932.

La revizoroj:
K-dino Jo van den Paverd (16193)
K-do J. van't Hof (14940)

Sekvantaj organizoj subtenis finance la 11-an Kongreson de SAT en Amsterdamo.

	Sumo
Het Nederlandsch Verbond van Vakvereenigingen, Amsterdam	Hol. gd. 100.–
Internationale Transportarbeiders Federatie, Amsterdam	Hol. gd. 50.–
Nederlandsche Bond van Personeel in Overheidsdienst, Amsterd.	Hol. gd. 50.–
Algemeene Nederlandsche Typografenbond, Amsterd.	Hol. gd. 50.–
Centrale Nederlandsche Ambtenaarsbond, Amsterd.	Hol. gd. 25.–
Nederlandsche Vereeniging van Fabrieksarbeiders, Amsterd.	Hol. gd. 25.–
Instituut voor Arbeiders Ontwikkeling, Amsterd.	Hol. gd. 25.–
Hilversumsche Bestuurdersbond, Hilversum	Hol. gd. 5.–
Algemeene Nederlandsche Bouwvakarbeiders Bond, Hilversum	Hol. gd. 20.–
Algemeene Nederlandsche Bond van Arbeiders in het Bakkers, Chocolade en Suikerwerkbedrijf, Amsterd.	Hol. gd. 25.–
Nederlandsche Litho-, Foto- en Chemigrafen Bond, Amsterd.	Hol. gd. 5.–
Algemeene Nederlandsche Bond van Arbeiders werkzaam bij Straten en Wegenbouw, Rotterd.	Hol. gd. 10.–
Nederlandsche Bond Van Particuliere Chauffeurs, Amsterd.	Hol. gd. 5.–
	Hol. gd. 395.–

12-a SAT-Kongreso en Ŝtutgart.

6.–11. aŭgusto 1932.

2-a listo de partoprenontoj.

26.	14941	Roelofs Gerrit,	Amstd.	(Holando)
27.	17543	Roelofs Gerardo,	Amstd.	(Holando)
28.	16995	Minke de Vos M. C.,	Amstd.	(Hol.)
29.	14942	Minke J. W.,	Amsterd.	(Holando)
30.	13025	Alings H. W.,	Amsterd.	(Holando)
31.	1	Lanti E.,	Paris	(Francio)
32.	24	Cachon Hector,	Paris	(Francio)
33.	1768	Bartelmes Norb.,	Paris	(Francio)
34.	3792	Glodeau S.,	Montreuil	(Francio)
35.	50	Glodeau L.,	Montreuil	(Francio)
36.	11	Banmer Lucien,	Paris	(Francio)
37.	13371	Sämann Ernst,	Tailfingen	(Germ.)
38.	17276	Essenberg Mar,	Amstd.	(Holando)
39.	14563	Blok Chr.,	Amsterdam	(Holando)
40.	17489	Gallo Suzanne,	Paris	(Francio)
41.	12642	Ozerée Alberto,	Paris	(Francio)
42.	741	Robert Eug.,	Le Raincy	(Francio)
43.	1162	Häckel Max,	Leipzig	(Germanio)
44.	16459	Ples Frederiko,	Amstd.	(Holando)
45.	17555	Pilz Marta,	Geislingen	(Germanio)
46.	10634	Surek Gottl.,	Kauern	(Germanio)
47.	17340	Werner Kurt,	Leipzig	(Germanio)
48.	320	Puff Ludw.,	Frankfurt/M.	(Germ.)
49.	7363	Schalmey Paul,	Hannover	(Germ.)
50.	14290	Huber Wilhelm,	Worms	(Germ.)
51.	13448	Jägge Eugen,	Eberswalde	(Germ.)
52.	126	Rival Joan.,	St.-Etienne	(Francio)
53.	13450	Schübel Hugo,	Goldlauter	(Germ.)
54.	13876	Goudbeek T.,	Zwolle	(Holando)
55.	8048	Burbey Louis,	Leeds	(Anglio)
56.	55	Aber J.,	Sucy	(Francio)
57.	1380	Planchon M.,	Sucy	(Francio)

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj.

La XI-a Liga Plenkunveno de Aŭstria Lab. Ligo Esp-ista.

La 27-an k 28-an de marto okazis en la Industria Halo de la Supra-Aŭstria urbeto Ŝtajr (Steyr) la ĉi-jara plenkunveno de ALLE. Krom la multaj grupdelegitoj ĉeestis granda nombro da gastoj, inter ili aro da oficialaj, partiaj k aliorganizaj lab. funkciuloj. K-do *Sichlrader*, la urbestro de Ŝtajr, salutis la kongreson en la nomo de l' tiea soc. dem. partiorganizo. K-do *Dressler* esprimis la bondezirojn de ĉiuj lab. kulturunuiĝoj de la distrikto, K-do *Konopisky* salutis nome de la centro de l'Aŭstria Liberpensula Ligo k parlamenta deputito K-do *Bitzany*, kiu reprezentis sian elektintaron k la soc. dem. deputitaron, instigis porti la lab. esp.-movadon en la junularon k tiel kunhelpi, ke la labor. gejunularo estu plenigata per socialista spirito. Multaj en- k eksterlandaj organizoj estis sendintaj salutleterojn.

El la raportoj estas menciinde, ke la Ligo en la lasta laborjaro unuflanke malgraŭ la terura krizo atingis belajn sukcesojn koncerne agnoskiĝon ĉe la lab. publiko, kursgvidadon, elkonstruadon de la organizo, plibeligon de la gazeto „La Socialisto“ ktp, sed aliflanke havis materiajn perdojn kompare al la antaŭa jaro: La Ligo nun konsistas el 53 (pasintjare 57) grupoj kun 1590 (1810) membroj, plie 97 izolaj anoj. En Vieno estas 22 (21) grupoj, en la provinzo 31 (36) grupoj; la unuaj havas kune 673 m., la duaj kune 820 membrojn, (pasintjare 841 k 858). La nuna membrostato (1590) konsistas el 1233 viroj k 357 virinoj. La kasraporto komunikis saldon da 1830.– ŝil., t. e. duoblo de la lasta jaro, do progreso, se oni konsideras la krizefikojn. Estro K-do Simon konstatis en sia raporto, ke ĝojige laborakcela fakto estas, ke ALLE estas preskaŭ unutendenca, k ke eĉ en grupoj, kie komunistoj kunlaboras, oni ordinare trankvile agadis por la bono de la movado. La kunlaboro de ALLE k SEA (Germanio) precipe sur la gazeta kampo estas bonega k estas espereble, ke ĝi ankoraŭ pli intimiĝos k intensiĝos.

La Plenkunveno aŭskultis k pridiskutadis du raportojn: K-do *Jonas* okupis sin pri „Ekonomia krizo k Lab. esp. Movado“, pri la problemo kiel la tuta organizado estas konformigota al la cirkonstancoj k kiel oni devos trovi vojojn, kiuj ebligos al la senlaborularo ne povanta materie oferi enviciĝi en la organizita movado. Ne estas daŭre tolerebla stato, ke ĉiu lab. esp-isto, kiu volas aktive partopreni la movadon, devas pagi duoblan kotizon, nome al LEA k al SAT. Estas dezirinde, ke finfine la SAT-direkcio k -anaro konsciiĝu pri tio k el la nuna SAT-aparato kreu komune kun la LEA-oj labortaŭgan k kreskopovan institucion. Sed kvankam ni, K-do Jonas diris akcente, ne konsentas pri la nuna formo de SAT, ni tamen neniel volas forlasi la esperon, ke fine venkos la racio k SAT fariĝos tio, kio ĝi povus k volus esti, kultura, instrua, *interilatiga* organizo bazita sur la laboroj de LEA-oj („REZERVUJOJ“). La rezolucio tiusenca estis unuanime akceptata; kiu pri ĝi pli detale interesiĝas, povos legi ĝin en „La Socialisto“ de aprilo, kiu po ŝ. aŭ. –.40 aŭ egalvaloro por n-o estas mendebla ĉe la centro de ALLE. La parolado de K-do *Weinhengst* montris vojojn k rimedojn de efika propagando inter la laboristaro. La rezolucio de li proponita k de la delegitoj akceptita rekomendas precipe viglan kunlaboradon de grupoj k membroj en la partiaj, sindikataj k aliaj lab. unuiĝoj, elkonstruadon de la Liga Gazetarservo k iniciaton de internacia soc. dem. esp. informservo. Ĝi ankaŭ komisias la Ligestraron klopodi, ke almenaŭ dum la varbsemajnoj la radio estu je nia dispono por propagandparolo.

La novelektoj rezultigis plejgrandparte la samajn funkciulojn, interalie: Estro – K-do prof. Simon, sekretario – Haagen, redaktoro – Seidl, Gazetarservo – Weinhengst, kasisto – Rastocky. *Gazetarservo de A. L. L. E.*

La XII-a Kongreso de F. E. O.

La XIIa Kongreso de FEO (Fédération Espérantiste Ouvrière) okazis la 27./28. marto en Bruselo. Pro tio ke tiu urbo kuŝas malproksime de la centro de la franclingvaj regionoj k ankaŭ multaj K-doj pro senlaboreco ne povis alveni, la nombro da partoprenantoj estis proks. 50, t. e. iom malpli ol en la antaŭa jaro. Sed la kongreso multe utilis al la *konfida kunlaboro* de la belgiaj k franciaj franclingvaj esp-istoj.

La kongreso unue devis ekzameni la eksigon de tri membroj, kiuj de pli ol unu jaro sabotis la laboron de la Federacio per senĉesaj, senbazaj insultoj k kalumnioj, k precipe perfortis la Statuton. Por ĉesigi la sabotadon k malhelpi la opoziciajn artifikojn, la Fed. Kom. estis decidinta, ke la mem-

brokartoj por 1932 estos elliverataj nur al tiuj, kiuj subskribos la *promeson agi laŭstatute.* Tiam la „opoziciestroj“ *ordonis,* ke oni *ne subskribu la (re)-aliĝbultenon por 1932,* postulante por si mem k por la nesubskribintoj la samajn rajtojn kiel por la lojalaj membroj! Ĉe la komenco de la kongreso tuj evidentiĝis la malforto de la opozicio per tio, ke ĝi estis reprezentata nur per 5 aŭ 6 anoj, inter kiuj unu eksigito, *Malfer* el Parizo. Al ĉi tiu lasta estis permesite eniri la salonon, sed li ne konsentis k „solidariĝis“ kun la 4 aliaj, kiuj estis rifuzintaj subskribi la aliĝilon kun promeso obei la Statuton, k sekve ne estis anoj. Tiuj eks-anoj estis allasataj en la galerio k traktataj kiel gastoj. Tiam ili komencis bruadi, kriegi k insultadi. Post malpli ol duonhoro da kriado la mizera kvinmembra „opozicio“ honteme forlasis la ĉambron.

Tiam la kongresantoj povis tute kviete dum du tagoj fari pozitivan laboron. Interalie ili unuanime akceptis statutkompletigojn, kiuj akcentas la unuecan eksterpartiecan karakteron de FEO k komisias al la F. K. malebligi ĉian kontraŭstatutan agadon.

La morala raporto (kiu entenis la punkton pri la eksigoj) estis akceptata per 433 mandatoj kontraŭ 36 k 16 sindetenoj.

Propagando k organiza plano, proponita de la F.K., jam parte efektivigita, k dank' al kiu, malgraŭ la skismo la Federacio jam nun havas 30% pli da izolaj membroj ol ĉe la fino de l' lasta jaro, estis unuanime akceptata.

Fine, la kongresantoj ankaŭ unuanime voĉdonis gvidrezolucion, el kiu ni citu nur jenajn punktojn, kiuj havas ĝeneralan intereson: „. . . La Kongreso decidas . . . komisii al la F.K., ke ĝi estonte *profitu ĉiun okazon, uzu ĉiun taŭgan rimedon por malebligi, ke FEO-anoj havu la emon enkonduki en la organizo la disputpunktojn,* kiuj kaŭzas ordinare la malunuecon de la nuntempa lab. movado. — La Kongreso opinias necese insisti pri tio, ke la *nura celo* de la Fed. estas la propagando de esp-o en ĉiuj lab. medioj *senescepte* (anarkistaj, komunistaj, socialistaj, sindikatistaj), kiuj agnoskas la klasbatalon kiel realan fakton . . .

„La Kongreso notas kun bedaŭro, ke la tuta agitado de l't.n. opozicio en FEO sin bazas sur programo, havanta *nenion komunan kun la propagando de esp-o,* kio *absolute malebligas la harmonian kunlaboron* de ĉiuj tendencoj k celas nur serveme identiĝi kun la programo de iu politika partio, — partio kiu eĉ ne povas pretendi al tio, ke ĝi arigas la plimulton de la laboristoj.“

En tiu rezolucio troviĝas ankaŭ punkto, kiu esprimas simpation al la Rusa Revolucio k alia, per kiu estas esprimita la firma decido daŭrigi fratan k intiman kunlaboron kun SAT k la espero, ke pli malpli frue la tuta lab. esp-istaro rekuniĝos laŭ la ĝisnunaj gvidprincipoj de SAT k de FEO.

SAT-ano 14 519.

EN NIA MOVADO
KRONIKO

Belgio. La membroj de l'*Antverpena* Marista esp. grupo preskaŭ ĉiuj forveturis. Ili decidis kunligi provizore la grup-havaĵon (bibliotekon ktp) kun tiu de la Wilryk-a labor. grupo „Al Unueco“. Estonta adreso do estas: Krijgslaan 204, Wilrijk-Antverpeno. — **Estonio.** La fakto, ke inter la membroj de Tartu-a „lab. esp. kleriga societo“ troviĝis kelkaj komunistoj, kiujn la politika polico arestis, k la aktiva subteno al esp-o de junsocialistoj kaŭzis en la burĝa gazetaro viglan eĥon. Soc. gazetoj respondis, ke lab. esp-istoj tamen ne deziras transpreni la „neŭtralan“ esp. movadon. Sekve de tiaj disputoj la intereso pri esp-o en la tuta lando kreskis. *Tallinn.* Junsoc. esp. kurso havis ĝis fino 40 p. k transformiĝis en daŭrigan kurson. *Tartu.* D-ro Andova, tutlande konata scienculo, aktivulo en la loka lab. esp. kleriga soc., elmigris eksterlanden, pro kio la societo okazigis adiaŭan vesperon. La gazetaro raportis. — **Francio.** La de H. Barbus direktata grandformata ĵurnalo „Monde“ ekpublikigos de nun ĉiumonate unukolonan kronikon pri la esp. movado; la favordecidon atingis K-do M. Ru (Roux)-Lyon. — **Germanio.** *Merkŝtajn (Aachen).* La grupo, kiu havas 20 membrojn (6 aktivajn), aranĝis dum 2 pasintaj jaroj 18 kursojn, 5 ekspoziciojn k 2 triland-renkontiĝojn k esp-igis 8 lokojn el la distrikto Aĥena. Novaj kursoj: 1 en Aĥen kun 16 p. (gvid. K-do Ackerman), 1 en Mariadorf kun 15 p. (K-do Sebastian), 3 en Merkŝtajn-Strajfeld kun 22 p. (K-do Georgi), 18 p. (K-do Maŭric), 1 por infanoj kun 15 p. (K-do Ackerman), 1 en Palenberg (10 p., K-do Skabrada), 1 en Boŝeln (9 p., K-do Ilsner), 1 en Herzogenrat (22 p., K-do Meister), 1 en Alsdorf (K-do Ridder). Nova grupo (10 p.) en Palenberg. En Eŝvajler k Virselen estas nun memstaraj grupoj, kiuj esp-igas siajn ĉirkaŭojn. Ĉiuj cititaj lokoj estas gvidataj el Merkŝtajn-Strajfeld. K-do Felp gvidas en *Düren* kurson kun 40 p. k intencas tie fondi grupon. En la jarkunveno ni fiksis dujarplanon kun novaj ampleksaj propagand-aranĝoj. (8801, 16740). *Dresden.* En kunveno de l'SAT-anaro de 14. 1. K-do Kuhnt raportis pri la loka situacio (la eks-peranto retenas la materialon k liaj kunuloj eĉ forŝtelis montrokeston el la popoldoma koridoro) k proponis reorganizi la lokan SAT-movadon. La „Grupo de SAT-anoj Dresden“ elektis kiel 1. peranton K-don Kuhnt (Seumestr. 28, N. 30), 2. per. K-do Ekert, kas. Klinger, protokol. Wachsmuth. K-do Köckeritz parolis pri la „rifo en SAT“ k alvokis gardi la supertendencecon por malhelpi ĉian pluan skismigon. Je 17. 3. la sama K-do parolis pri „ĉu partia aŭ supertendenca esp. organizo?“, esprimante sin kontraŭ partiigo de SAT. Li trovis aprobon ĉe la 19 ĉeestantoj. Je 26. 5. K-do Wachsmuth parolos pri „ĉu sennacia aŭ internacia esp. organizo?“ (1589). *Berlin.* En B.-Neukölln K-do Wittbrodt, lernejestro de senreligia lernejo, instruas en la programo de l'regula instruplano esp-on al ĉ. 90 infanoj. La gepatroj de l' lernantoj apartenas al la komunista (ĉ. 60 %) k socialista (ĉ. 40 %) partioj. La klas-instruistoj partoprenas en la instruado, kiun gvidas K-do W. *Hagen (Vestf.).* Unu jaron ekzistas SEA-grupo. Aŭtune ni starigis junular- k ekskurs-grupon k povis aliĝi al „ŝtata junularprizorga komitato“ (ni tiel pagas nur la duonan veturprezon ĉe ekskursoj de min. 10 p.). Krome ni anas ĉe Lab. Kulturkartelo k lastatempe aliĝis ankaŭ al la „Fera Fronto“. (10865.) *Leipzig.* Je 26. 2. finiĝis SEA-kurso en Popoldomo kun 15 p. (gvidis K-do Löffel). 7 aliĝis al SEA k SAT. Je 4. 3. malfermiĝis progresinta kurso samloke kun sama kursgvid. (17734). Ĉe la ĉefstacidomo okazas por-fervojista kurso (15 p). Kursĉambro senpaga laŭ interveno de l'Germ. Fervojista Esp.-Ligo. La venonta kongreso de ĉi tiu Ligo okazos la 8-an de majo en Hanovero. (Salutlet. ktp direktu tiuokaze al K-do *M. Neugebauer,* Alb. Niemannstr. 14, *Hannover* [por la Germ. Ferv. Esp. Ligo]). (1162.) *Grosschönau* (Sa.). Je 5. junio okazos ekzamenoj pri kapablo, por kursgvidado k scienc-pedagogiaj de l'Regna Esp. Instituto. Petskribon k biografion (germ. k esp-e) sendu al K-do H. Scherbaum, Feldstr. 3, Grosschönau. *Durlach* (Baden). La 24. 4. okazos ĉi-loke la Unua Badena Lab. esp.renkontiĝo, kie parolos i. a. K-do Puff. Esp. ekspozicio de la Karlsruhaj K-doj okaze de naturamika varbfesto. (Komparu anoncon en „S-ulo“ n-o 385). *Ŝtutgart.* Je 18. 2. Ulo paroladis kun lumbildoj pri esp-o ĉe junaj oficist-sindikatanoj, trovante intereson, sed *ne* studontojn. El la germanlingva „La Lab. Espismo“ ni jam vendis 30 ekz. La estroj de ĉiuj Virtembergaj naturamikaj grupoj ricevos de ni varbmaterialon k cirkuleron. — **Polio.** La estraro de l'(300-membra) bakista sindikato en *Krakovo,* klopodante ankaŭ pri kleriga laboro, aranĝis esp. kurson kun 14 p. (el kiuj 1 SAT-aniĝis). Koresp. kun esp. samprofesianoj alilandaj ekaranĝita. — **Svedio.** *Farösund.* Rektmetodaj komenc. kursoj dum jan. k febr. por ĉiuaĝuloj (gvidis Hurler, Köln). Lekcioj de Hurler aranĝitaj de lokaj lab. organizoj en jenaj lokoj: *Ljugarn, Burgsvik, Hafdhem, Hemse, Roma.* En *Visby* kursoj de Hurler depost 15. 2. kun 80 p.; apartaj kursoj por infanoj. (17517). *Malmö.* La lab. esp. klubo funkciigis kursojn sub gvido de *V. Krej* (5486) el Lajpcig laŭ rekta metodo. Funkcias en Malmö 1 komenc. kurso (22 p.), 1 konversacia (12 p.). En *Vellinge* 1 komenc. (17 p.), *Arlov* daŭriga kurso (15 p.). Krom tio laboras 7 rondoj kun sume 75 p. sub aranĝo de A.B.F. Instruas K-doj el lab. klubo. (13132). *Abisko.* Daŭriga kurso kun ĉ. 20 p. (Gvid. E. Nyman, kiu krome instruas al siaj lernantoj en pop. lernejo). *Boden.* Finiĝis rektmetoda kurso kun 35 p. (18. 3.) *Kiruna.* K-do Backman estas nova prezid. de esp. klubo „La Lapono“ kun pli ol 100 membroj. Plej ofte oni diskutas en la klubo pri politikaj temoj. *Lulea.* Finiĝis rektmetoda kurso kun 38 p. (19. 3.) Publika propag. ekzameno k festo (ĉeestis en ambaŭ ĉ. 150 p.) Teatro-prezento („La 5 mondpartoj“) kun rap. de l' gazetaro. *Malmberget.* 30 „Amikoj de Sovetio“ petis lokan ABF helpi aranĝi esp. kurson, ĉar parto el ili ricevos laboron en Sovetio, aliaj vizitos ĝin. En loka popollernejo okazas esp-instruo. *Sunderbyn.* 15 popol-altlernej-anoj (vilaĝanidoj k laboristidoj) memstare studas esp-on per koresp. kurso.

Ne nur por la kongres-partoprenintoj k aktivaj SAT-anoj, sed por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la vivo de SAT k la evoluo de l'lab. esp. movado, estas nepre havinda la

PROTOKOLARO
pri la XI-a SAT-Kongreso

112 denstekstaj paĝoj. Havebla kontraŭ

0,15 mk. g. (kosto de l'afranko) por SAT-anoj k „S-ulo“-abonantoj (propra ekz-ero)

0,45 mk. g. (memkosta prezo) por ceteraj ekz-eroj.

ADMINISTRACIO DE SAT, Kolmstrasse 1, Leipzig O. 27.

POR NEDERLANDANOJ:

J. MINKE, Veeteeltstr. 156, Amsterdam-W.

Helpu prosperigi esperanton en la hispaniaj laboristaj medioj.

Konstatinte, ke en Hispanio la poresp-a afero plejgrandparte disvolviĝas en burĝaj rondoj k plie, spertinte ankaŭ la doloriğan fakton, ke nur komercocele oni eldonadas aĉajn, tre arkaiĝintajn gramatikojn, mi entreprenis sub mia respondeco zorgan verkadon de „Kompleta Gramatiko de Esp-o por hispanoj". Tamen, mi devas malkaŝe konfesi, ke multaj el niaj enlandaj SAT-anoj malmulton seriozan pretigis. Estas multe pli facile interrilati kun eksterlanda K-d(in)o, ol kun enlanda SAT-ano. – Kial tiel okazas? – Mi klarigos tion en artikolo pritraktonta la ĝeneralan politikan staton de Hispanio, malgraŭ ke nia bon-informita K-do 3 020 jam fidele raportis.

Mi do petas pri sendo de sugestoj aŭ model-aj tekstoj, originale verkitaj pritraktantaj ion, kio estas ekskluziva, ankoraŭ nun, en viaj respektivaj landoj. Krome, bonvolu ankaŭ respondi jenajn demandojn:

Ekz: Kiaj devas esti la plej preferataj temoj por instrui junaĝajn lernantojn? – Ĉu esp-o estas escepto de l'logiko en lingvaj aferoj, k tial oni povas ĝin instrui tute aliel al lernantoj, ol oni tion faras, kiam temas pri nacilingvo? – Kiel devas esti verkita ajna lernolibro, por ke simpla k nesufiĉe instruita homo povu eltiri el ĝi kontentigan profiton?

Skribu al: K-do G. Pujol, str. SALVADOR SEGUI 15. *Palafrugell* (Gerona).

Pri esp. gazeto en Portugalio [1]

Ni resumas el skribaĵo de K-do Herta N. (Lisbono) jenon:

La riproĉo farita al „La Okcidentulo", ke ĝi ne estas organo de prol. esp. movado en Portugalio, ne estas justa. 1) Kvankam titolklarigo mankas (pro la diktatoreco k cenzuro), oni bone scias, ke la eldon. estas klaskonsciaj laboristoj k bone interrilatas k reciproke kunlaboras je bezono kun aliaj. 2) En la lasta n-o de „La Okcid." oni legas: „organo de l'esp. movado en P.", kio ne volas diri: de l'*tuta* esp. movado, certe, sed de la *plej granda kvanto da esp-istoj* (ĉar eldonata de la plej granda esp. societo en la lando.)

El la Administrejo.

La jam delonge sopirita jarlibro de SAT aperis k estas ekspedita. Kiu rajtas ricevi ĝin? Ĉiuj aktivaj k pasivaj membroj el la jaro 1931, kiuj komplete pagis sian jaran kotizon (escepte la eksigitoj k mem-eksiĝintoj). Plie ĉiuj aktivaj, aspirantaj k subtenantaj membroj de la jaro 1932, kiuj pagis aŭ komplete sian membrokotizon aŭ almenaŭ la *duonon* de l'*aktiva* kotizo. *Adm.*

Protesto.

Ni ricevis jenan „proteston", kiun ni enmetas sen ia komento; ni ja deziras nur bonon al la protestanto.

Reekzameninte la Protok. pri la XIa SAT-Kongreso mi trovis en la komenco de la p. 81 *tre fuŝan* raporton, kun kiu mi ne povas konsenti. Mi nur respondecas pri tio, kion mi mem kontrolis, sed tiu parto ne estis submetita al mia kontrolo. Mi scias tre bone, kion mi diris, sed se oni plektis la vortojn por doni al la frazoj alian sencon, mi protestas *energie*, ĉar same kiel mi aprobis la ceteran parton, mi ankaŭ malaprobas tion, kion mi konstatas *fuŝa*. *A. Soares.*

Parizo, 13. III. 32.

RADIO-PROGRAMO:

21. aprilo:
21.15–21.35 ? : Kaunas, 1935 m, parolado.
22.35–22.45: Breslaŭ-Gleivitz, 10 minutojn esperanto por laboristoj.

22. aprilo:
22.05–22.30: Leningrad, 1000 m, informoj.
23.30: Lisboa CTIAA, 42, 90 m, informoj.

23. aprilo:
21.15–21.25: Lyon-la-Doua, 466 m, parolado.
23.00–23.30: Minsk, 117,3 m, parolado *(same la 27. k 29. IV.).*

24. aprilo:
9.10–9.35: Hilversum, 298 m, kurso (lab.) – *ĉiudimanĉe.*

[1] Komp. n-on 385, p. 151.

EKSTER NIA MOVADO

La Kantona Universitata Ligo dissendis *esp-lingvan* „alvokon al la tutmondo kontraŭ la japana buĉado en Manĉurio", en kiu estas dirite i.a.: „Ni kredas, ke la nunan sovaĝan agadon en Manĉurio respondecas nur la jap. militaristoj, kiuj, el la jap. popolo, estas nur la malplejmulto. Ni kredas, ke la plejparto de la jap. popolo amas pacon k malaprobas tian agadon. Sed ni petas, ke ili nin subtenu, ĉar, antaŭ ol patriotismo, estas paco k homamo, multe pli nobla, multe pli honora."

*

La Aerologia Observatorio en Tateno apud Tutiura (Ibaraki-ken), Japanio, eldonis por la sesa fojo sian jarlibron (grandformatan, 209 pĝ.) kun statistikoj pri meteorologiaj observoj *en esp-o.*

*

D-ro Privat, konata gvidanto de UEA, vojaĝinte samtempe kun Gandhi al Hindio, propagand-paroladis en tiu lando pri esp-o, ĉe la universitatoj de Delhi, Benares, Santiniketan, k ankaŭ en Madras. En diversaj lokoj fondiĝis rondoj por eklerni la lingvon.

*

Politikaj ekzilitoj en Kajeno („Diabla insulo") eklernis esp-on, kiu servis al ili por eviti, kiel vive-entombigitoj freneziĝi.

*

La 5-a ĉeĥoslovaka esp. kongreso okazos de 14/16. majo en Olomouc (Moravio).

*

La Hispana Esp.-Asocio kolektas helpe de tutmondaj esp. geinstruistoj infanajn manlaboritaĵojn por fari gravan ekspozicion kun konkurso (premioj). La materialo restos je la dispono de l'Instru-ministerio por formi Internacian Muzeon el Lernejaj Manlaboritaĵoj.

MEMORNOTO

Pro tio ke ne estas eble sisteme raporti pri ĉiuj lab. gazetoj enpresantaj pri- aŭ per-esperantajn artikolojn (ni ekscias ja nur pri parto el ili!), k ankaŭ por ŝpari spacon, de nun ni notos nur pri gazetoj, kiuj represis el „S-ulo" aŭ raportis pri SAT-Kongreso ktp.

Represis el „S-ulo":

Rahva Söna, Tallinn, 18. 2., nova LEA-gaz. (381), esp. en Ned. (381), 28. 2., esp-igita urbeto (382), ekster nia mov. (382), 2. 3., senlab. en Bulg. (382), let. el Kalif. (382), klasbat. (383); *Le Flambeau*, Brest, marto, instruado en Hol.; *L'Ecole Emancipée*, Saumur, 13. 3., el usonaj min., el Ĉinio (Perer); *L'Effort*, Lyon, 19. 3., striko en Hol. (384), malsato en Jap. (384); *Le Libertaire*, Paris, 11. 3., el Bulg.

Pri „S-ulo" enhavis anoncon:

Le Populaire, Paris, 19. 3.; *La Voix Libertaire*, Limoges, 19. 3.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Münchener Post, 21. 3.; *Fränk. Volkstribüne*, 18. 3.

NIA POŜTO

W. W. 15 413. – Publikigante pagitan reklamon pri la usona eldonejo tio ne signifas, ke ni mem rekomendas aĉeti la verkon. Sekve ni havas nenian respondecon en tiu afero k ne povas elspezi por enketo.

G. Bernet. – Aperos via artik.

Ligo de Bak., Krakov. Alvokoj pri koresp. ne estas senpagaj (vd. tarifon)! – *Red.*

14946. – Anonco de K-do Zachte kostas –.50 guld.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. – Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L=letero, PK=poŝtkartoj, PI=poŝtkartoj ilustritaj, PM=poŝtmarkoj, bfl.=poŝtmarko sur bildflanko, kĉl.=kun ĉiuj landoj, esp-aĵo=esperantaĵo.

ARGENTINO

K-do Isidro Berman, Cabildo 868, *Buenos Aires*, kun gelernantoj, PI, fotoj.

BULGARIO

S-ro V. Stojan (instruisto), *Beglej*, Plevensko, kĉl, L, PK, PI, ĵurn.

GERMANIO

K-do F. Hardt (20 j., elektristo), Mehlstr. 13, *Oberhausen-Osterfeld*, kun eksterl. Gek-doj pri fakaj temoj k politiko. Tuja resp. garantiata.

Poŝtkartvesperon aranĝos nia lab. grupo dum majo. Amase sendu PI al K-do J. Köhler, Neugraben, *Bautzen/Sa.* – Resp. gar.

HISPANIO.

Grupo de esperanto „Juneco", Valencia 383, *Barcelona* dez. koresp-adon por siaj kursanoj, kĉl. L, PI.

Ĉiu franco, kiu dez. praktiki la hisp. lingvon, skribu al Julian Aguilar, G. de Castro 38, *Valencia*, por interŝanĝe praktiki la francan.

JUGOSLAVIO

Grupo de gelernantoj koresp. pri ĉ temoj, L, PI, kĉl. Adr.: Esperanto *Ptuj.* – K-dino Zinka Zuran, kafejo Stuhec, *Ptuj.* – K-do Gernardo Kralj, Krekova 5, *Ptuj.*

NEDERLANDO

40 gelernintoj de esp. kurso koresp. kĉl. Gek-doj. Sendu L, PK, PI al: K-do E. Zachte, Henriette Ronner Str. 2/II., *Amsterdam (Z).*

NORVEGIO

Koresp-adon serĉas 22 Ĉe-kursanoj. Skribu facile. Adr.: Lab. Esperanto Grupo (H. Schjerve), Rosenv. gt. 23, *Trondhjem.*

SOVETIO

K-do *Seĉonov* N. P., St. *Barda, Zap. Sib.* Kraj. kĉl pri ĉt., interŝ. gaz. PI, PM.

K-do *Burikin* B., Proletarskaja 141, *Barnaul*, Zapadn. Sibirj., kun fotoamatoroj, peras por IRH-organizoj.

K-dino *Rabkin* A. R., 15-jara junpionirino, Internacionalnij per. 19, *Gomel*, kor. pri ĉt., precipe pri la vivo de lab-istinoj k ties infanoj.

K-do *Veselov* I. M., Pavlovskij Zavod, Zap. Sib. Kraj., S. *Borovikovo*, ŝkola. kĉl, pri ĉt.

K-dino *Reliŝko* V., Butirskij val 62 kv. 3, *Moskvo* 55, kĉl, pri ĉt.

ENHAVO

	paĝo
Unua de majo — Tago de laborista solidaro	153
Elekto de Regna Prezidanto en Germanio	154
Alarmo en Germanio	154—155
Generalo murdita	155
El Polio	156
Nova politika partio en Nederlando	156
El Britio	156
La reakcio organiziĝas en Estonio	156
La klasbatalo tra la mondo	157
Reliefaj okazintaĵoj	157
Malarmado	157
Sennaciula pedagogia paĝo	158
Tra Esperantio	159—162

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)

LA LERNANTO 4 — 7-a JARO. N-o 4 — MONATA ALDONO AL SENNACIULO — 15. IV. 1932

Kiel mi fariĝis esperantisto.

Finservinte kiel soldato mi kun mia frato, post unusemajna restado ĉe miaj gepatroj, formigris piede por serĉi laboron. Mia metio estas veturilfaristo, lia — ladisto. Ni interparolis pri diversaj temoj, finfine ankaŭ pri esperanto. Ĉar mi ankoraŭ nenion estis aŭdinta pri tiu lingvo, mia frato informis laŭ sia scio pri ĝi. Interalie li ankaŭ diris, ke per esperanto ĉiuj nacioj povos interkompreniĝi. Post tiu ĉi informo ĉio estis forgesita de mi. Mia frato restis en Gablonz, ĉar li ricevis laboron k mi sola plumigris.

Veninte al Denis (Dönis), mi ankaŭ trovis laboron. Kia ĝoja surprizo, kiam iun tagon mi rimarkis, dum miaj ĉiuvesperaj promenadoj, afiŝon kun verda stelo k jenaj vortoj (esperante): Lernu esperanton! (k germane) Kurskomenciĝo la 1-an de okt. 1929. Anoncojn akceptas Rudolf Leŭtelt ktp. Mi tuj anoncis min ĉe la nomita K-do, mia instruonto. La 1-an de oktobro ni kvinope komencis studi; baldaŭ tri forrestis k post la kristnasko-festo mi restis tute sola. Malgraŭ tio mi ekzercis min plue.

Jam dum novembro mi komencis korespondi kun diversaj eksterlandanoj. Post novjaro mi vizitis daŭrigan kurson, ĉar tiu por komencantoj ne plu funkciis. K-do Frühauf el Ullersdorf gvidis tiun kurson por progresantoj tre praktike. Mi ankoraŭ ne plene kredis, ke la lingvo fakte estas praktika ilo por reciproka kompreniĝo, ĉar nenian okazon mi havis por interparoli kun iu fremda homo k ekvidi la uzeblon de la lingvo. Tiam, dum somero 1930 okazis limrenkontiĝo en Strasberg apud Tafelfiĥte.

Multaj Gek-doj el diversaj distriktoj de Ĉeĥoslovakio k Germanio partoprenis ĝin; ĝoje mi spertis, ke oni fakte povas interkompreniĝi nur per esperanto, k depost tiu tempo mi estas fidela ano de la lingvo. En aŭtuno, dum la sama jaro, estis aranĝita kurso por komencantoj. Denove mi ĝin vizitis, ĉiuj finlernis; ĉiuj jam bone uzas la lingvon, kvankam ne tute senerare, sed sufiĉe kompreneble. Ni nun ekzercas nin per parolvesperoj k legvesperoj. Mi proponas al ĉiuj komencantoj: restu fidelaj al la lingvo, ĉiam ekzerciĝu, la ĝojo estos granda por ni, se ni povos interkompreniĝi kun fremdlingvanoj. Por ni klaskonsciaj laboristoj esperanto estu armilo! Scio estas potenco.

Alois Olbert, Dönis apud Grottau a N.

POR NIA DISTRO:

Solvo el la antaŭa n-o:


Mitridato, Irlando, Litanio, Italio, Tandemo, Dante, Adamo, Natrio, Ĝardeno, Eldorado, Reĝido, Ontario.

Vortoj de Kamarado E. Lanti

192 paĝoj. — Formato 13×19 cm.
Prezo: 1.80 mk. g.

Administracio de SAT, Kolmstr., Leipzig O 27.

Krucvort-enigmo.



Horizontale:

1. Loĝanto de lastatempe multe nomita grandurbo.
2. Antikva tribunalo (rad.)
3. Numeralo
4. Pronomo
5. Participa finaĵo
6. Planto (rad.)
7. Mambesto (rad.)
8. Kultaĵo (rad.)
9. Mankas ono al vestnecesaĵo
10. Virina nomo (mallongigo)
11. Insekto
12. Pronomo
13. Elpaŝi (rad.)
14. Poemo

Vertikale:

1. Enigmo (rad.)
2. Sufikso
3. Pago (rad.)
4. Komercaĵo (rad.)
5. Rilata al la vido
6. Sufikso
7. Maŝino (rad.)
8. Klara (rad.)
9. Kantrondo
10. Konjunkcio
11. Mallongigo
12. Vegetaĵo (rad.)
13. Jesiga
14. Fari (rad.)
15. Rivero en Francio
16. Montri gajon (rad.)
17. Karakterizo de arkitektura stilo (rad.)
18. Antaŭ substantivoj
19. Prepozicio

(rad. = radiko)

Ŝerc-enigmoj por trovemaj infanoj

1. Knabo diris: Mi havas same multe da fratoj kiel da fratinoj. Sed lia fratino diris: Mi havas la duoblon pli da fratoj ol da fratinoj! Kiom da gefratoj estis?

2. Kial kapitano ne devas esti daltonisma (erarema pri koloroj)?

3. Kial rano saltas trans la straton?

4. Kiu povas respondi en ĉiuj lingvoj?

5. Kiam la malgrandaj terpomoj gustas plej bone? *(Solvoj en la venonta n-o.)*

Humoro

Inter servistoj.

— Johano, mi foriros de mia nuna mastro. La kafon matene k ĉiun manĝaĵon dum la tuta tago mi devas alporti de kontraŭflanka restoracio supren al nia loĝejo en la tria etaĝo. Speciale la kafo kolerigas min ĉiumatene! Ĝis mi atingis kun ĝi la trian etaĝon, mi jam forverŝis la duonon en la subtason!

— Ho, Henriko, ankaŭ mi ja devas alporti el la restoracio! Kaj la aferon kun la kafo mi solvas jene: Malsupre en la domo ĉe la piedo de la ŝtuparo mi prenas plenbuŝon da kafo el la taso, kuregas supren, k supre mi refluigas la kafon el mia buŝo en la tason, — k mia mastro ĝojas pri tio, ke neniom mi forverŝis k la taso estas tiom plena!

Laŭ LA GAJULO.

7-a JARO. N-o 4 MONATA ALDONO AL SENNACIULO 15. IV. 1932

La Lernanto

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris XII-e :: ADMINISTREJO: Kolmstrato 1, Leipzig O 27

Mi iras al kurso....

Kredeble estas banalega temo skizi, kien, kiel, kiam kursgvidanto iras por instrui esperanton al mez-, sen- aŭ eĉ malkleraj lernantoj. Sed, karaj lernintoj aŭ lernantoj, mia artikoleto ne rilatas la nuran fakton, sed temas pri la malegalaj vojo k cirkonstancoj, laŭ kiuj kursgvidanto plenumas sian taskon. Kompreneble, la lernantoj klasigas kursgvidanton en la kategorion de instrulaboristoj: instruistoj, profesoroj, doktoroj aŭ similaj homoj, kiuj mem „scias nenion k nur ĉion demandas“ el la malfeliĉaj lernantoj. Tion, kion la lernantoj *scias*, neniu instruanto deziras aŭdi. Laŭ sia malica karaktero li distingas — ŝajne laŭ la nazo — tiujn, kiuj ne scias pri io. Kaj oni povas veti, ke li nur eldemandas ĉi tiujn. Se lernanto scias respondi 99 demandojn el 100, la instruanto certege demandas tiun lernanton pri la centa demando nesciata. Ĉion nur, por hontigi k kolerigi lernantojn, por mokigi k ridigi la aliajn. Prave! Kursgvidantoj estas malamindaj!



Plej granda plezuro por kursgvidanto estas makuli kajerojn de lernantoj per ruĝa inko. Kaj kiom? Ili ne estas rekoneblaj! En taskoj faritaj plej zorge k atente, li scias spione trovi tiom da malkorektaĵoj, ke estas preferinde ĉesi lerni. Se li ne trovas erarojn en iu tasko, li trarigardas dufoje, poste li malbonhumoriĝas por daŭro de kelkaj semajnoj. La kurso kostas ja multege da mono. Sed dankeman kursgvidanton oni ankoraŭ ne vidis. Kion do li faras per la mono? La ĉambro estas preskaŭ senpaga. (Li nur mensogas al ni pri la prezo.) La librojn liveras la asocio. (Sed li postulas grandan sumon por ili.) Li havas luksan vivon per nia malfacile perlaborita mono. (Sed li ĉiam plendas pri monmanko k tiom pli turmentas nin.) Certe estas plej facila ago, preni la tekon (librujon) k iri kursejon por tie ŝajnigi sin saĝa. Sed — aŭskultu lin mem!

Ĉapitro unua: Kurso en mia hejmurbo.

Horo: 19-a,15! Mi metas en tekon la instrulibron, kajerojn k eventualajn montrotaĵojn. Sufiĉe bonhumore mi ekiras dum bela vetero al la kursejo. Distanco: 10 minutoj. Alveninte tien, mi ordigas la meblaron laŭ bezono, preparas instruilojn k min mem k atendas „ilin“. Ili, t. e. la kursanoj, venas sufiĉe akurate, eĉ venas *ĉiuj*. Ĉies vizaĝoj vidigas fervoran lernemon, preton, kontenton. La skribtaskoj de l'antaŭa leciono estas faritaj sufiĉe korekte. Tial mi havas ioman rajton taksi „ilin“ hodiaŭ tre kapablaj. Salutoj k demandoj esperantlingvaj estas bone komprenataj. Kontentige „fluas“ ripetaĵoj k novaĵoj. Eĉ bonan komprenon pri la mondlingva problemo mi konstatas. Senĝene pasas la kurstempo (du horoj). Hejmenirante mi multe babilas kun la parolemuloj laŭ iliaj povoj. Ĉiuj adiaŭas, entuziasme atendante la sekvontan kursvesperon.

Ĝojige, ĉu ne? Sed sciu, ke tio estis modela leciono, donanta ĝuon al in-

struatoj k instruanto. Sen troigo! Tiaj lecionoj okazas ofte, sed pli ofte mi travivas tiajn el la sekvanta speco.

*

Skribtaskojn mi korektis! Kio plue? — Fuŝo, malkorektaĵoj, stultaj eraroj, nenia kompreno pri gramatiko k sintakso! Unuopaj vortoj aŭ tutaj frazoj mankas pro nescio. Multaj taskoj estas skribaĉitaj preskaŭ nelegeble! Ĉio ĉi kvazaŭ farĉis min per kolero, ĵetinda plej akrasone sur la lernantojn. Ho, se mi havus ilin ĉi tie! Mi ja dirus al ili „la veron“! (Fakte mi tute nenion farus.) En fornon mi ŝtopu la kajeraĉojn! (Tiam mi ja devus pagi ilin!) Nu, mi simple faru du dikegajn ruĝajn „diagonalojn“ sur ĉiun paĝon. Mi ja ne gajnis miajn nervojn, tempon k ruĝaninkon en la loterio. Mia pulso certe jam atingis 130 batojn por minuto. (Sed la kursanoj ja devus resti malsaĝaj, se ili ne povus lerni per propraj eraroj.) Mi malbenu! Sed samminute mi kompatas la malbonŝancajn miaspeculojn pro konstateble malmultaj klerig-okazoj ĝuitaj de ili. Tiel ekscitite, anime „disŝirite“, mi hodiaŭ iras al la kursejo ... Pluvegas! Vento hurlanta klakigas pluverojn sur vizaĝon kiel pinglojn. Vento, pluvo, aŭtoj ŝprucigas stratkoton sur la pantalonon. Alveninte en kursejon, mi konstatas, ke, kiel supozite, ioma nombro da kursanoj ne venis pro malbona vetero. Ĉu eble ili tute forrestos? Ne gravas! Diablo prenu la tutan instruadon! Mi nun igas ripeti la lastsemajnan lernaĵon. — Ĉio forgesita! — Mi traktas novaĵon. — Nenia kompreno! Akuzativo ŝajne tute ne ekzistas. Mikso de aktivo k pasivo troas. Apenaŭ ili scias la signifon de „la“. Stultaj mienoj — malfervoro — eĉ intervokoj, ke esperanto estas pli malfacila ol alia lingvo k krome utilas por nenio. Fine la kurstempo pasis, sed — preskaŭ senrezulte. La lernantoj ne profitis, la instruanto ne kontentas pri la progreso. Do senĝua vespero por ambaŭ partoj.

Ĉiuj rapidas for por eviti, ke mi devigu ilin paroli iom en esperanto. Kaj mi? Hejmen! — Tie mi forĵetas la instruilojn, k ekfalas mem en la liton.

Sed pro kapdoloroj mi hodiaŭ longe devas atendi la dormon k havas sufiĉan tempon por cerbumi, laŭ kiu idea direkto necesas fordoni sian energion senrezulte, fuŝperdi sian liberan tempon sen ia kontentigo ...

(Daŭrigota.) *SAT-ano 5320.*

Interparolo.

A: La plej granda problemo de l'amo estas la eksedziĝo k en ĝi la plej malfacile solvebla punkto estas la infanoj.

B: Sed plej bone estus, se la komunumo zorgus pri la infanoj.

A: Ekster la limoj de UTOPIA[1] tio verŝajne ne estos ebla.

B: Kial ne?

A: La rimedoj ne sufiĉus por ĉiuj, se oni farus tion per la mono de la komunumo. La mondo estas tro malriĉa. Ĉiam ankoraŭ la malriĉo estas la granda problemo. Kion vi farus pri ĝi?

B: Malpermesi!

A: Kiel??

B: Laŭ diversaj manieroj. Se necese, mortpafi ĉiun, kiu perlaboras malpli ol 10 000 markojn jare k ankaŭ tiun, kiu postulas pli. Ne estas ja nova ideo. Malriĉo estas malica infekta malsano k malhavo estas la kaŭzo de ĉia ŝtelado. *Kompilis H. Garten.*

Libera Amo.

Ridetojn interŝanĝis: — koroj tuj ekflamis,
Lumbrilis la ĉiel', la tero sin ornamis.

Burĝonoj krevis, birdoj kantis sur la branĉoj,
Senleĝe geedziĝis l'junaj gefianĉoj.

Murmuris tuj kolere la kunloĝantaro:
Edziĝo sen abato ... tute sen altaro!?...

Ĉu ili ja malŝatas religian preĝon?
Eĉ ili kuraĝiĝis ĵeti for la leĝon?!“

Por niaj gefianĉoj tio ja ne gravas.
For ĉiuj antaŭjuĝoj! — La junuloj pravas.

Tielan unuiĝon ne riproĉu, — laŭdu.
Naturo ĝoje festas, ni atente aŭdu:

Sur arboj pepas birdoj, kantas najtingaloj...
Aliĝis eĉ Amor' al Novaj Idealoj!

Portugallingva originalo de Joao Augusto,
trad. de I. A. Barros.

LINGVAJ NOTOJ.

Demandoj de K-do 4378:

1) Iu trinkis en gastejo du glasojn da biero k mendas trian. Ĉu li trinkos *plian* aŭ *pluan* glason da biero?

Respondo: *Plia* estas la korekta formo (vd. en *Plena Vortaro*, pĝ. 372, = aldona, ekstra). „Pli“ esprimas ja kvanton aŭ gradon, dum

[1] Romano pri ideale socialisma ŝtato de la angla verkisto Tomaso Mur (Th. Moore).

plu esence havas tempan signifon (de *daŭro)*.

2) Ĉu ekzistas speciala termino por la germana vorto „Vorturner"? Ĉu *pre*gimnastikulo?

Resp.: *Ĉef*gimnastikulo ĝenerale sufiĉos por traduki la nomitan terminon el la sportfako. Se oni tamen volas insisti pri la kvalito k funkcio de la koncerna persono, pli preciza estas: *modelgimnastikulo* aŭ *instrugimnastikulo*. Ni ne kreu novan prefikson (pre-).

3) Oni uzas la vorton „ektimi" ofte en kazo, kiam ne temas pri *timo*. Ekzemple, mi promenas sur vojo k subite ĉi tiun transsaltas vigla leporo venanta el arbetaĵo. Pro tio mi ne havas timon, kvankam mi — laŭ esp-a esprimmaniero — *ektimas* (germ.: *zusammenfahre)*. Ĉu estas tradukeblo pli trafa?

Resp.: En okazo, en kiu ne temas propre pri *timo*, oni povus diri: *ekskuiĝi*. Ĉiu neatenditaĵo trafanta niajn sentojn (ekvido, ekaŭdo ktp) produktas ĉe ni tamen reagon, kiu tre parencas al *timo*. Oni *ektimas* tiom longe, kiom oni ne akiris certon pri la sendanĝereco de l'surpriza trafaĵo (vidaĵo, aŭdaĵo ks). Aliflanke (se temas pri tradukado), oni neniam laŭlitere traduku iun tekston, sed repensu laŭsence en esp-o: tiam laŭ la aparta senco de l'frazo oni trovos taŭgan verbon por esprimi la eksenton produktatan de iu subita impreso. Ekz. se temas pri aferoj de konveno aŭ deco, oni ne dirus: *ektimi*, sed *ŝokiĝi*.

En la venonta n-o ni respondos al demandoj de K-do 5320. *L. L.*

De infanoj por infanoj.

Manifestacio.

Dimanĉe posttagmeze okazis manifestacio kontraŭ malplialtigo de la salajroj. *Duboa* vidis la popolamason apud la stacidomo. Ĉe la monumento memore de *Gesd* oni pendigis jenan afiŝeton: „Nenian, eĉ ne unu centiman malplialtigon de la salajroj!" *Karpantie* vidis multajn ruĝajn flagojn k multe da specialaj policistoj. *Demlnaer* sekvis post la irantaro, malantaŭe la ĝendarmoj. Homoj kriis: „For la salajran malplialtigon!"

Viro kantis: Ni dancu la *Karmanjolon!* (revolucia ario). En la strato *Dobenton*, *Dekotinj* vidis ĉevalon de policano hufobati k tri ĝendarmoj falis teren.

Verkis lernantoj el Rube *(Roubaix, Nordfrancio)*.

La vagula laboristo.

Merkrede vespere, juna k pure vestita viro demandis al mi: „Kie loĝas la sinjoro vilaĝestro?" Tio estis pola laboristo. Li nomiĝis Bobel Stanislas. Li laboris ĉe la fervojo en *Donzer*.

Oni maldungis la laboristojn. Li diris: „Mi ne estas la unua, k mi ne estos la lasta, kiu postulas laboron."

Li tre malsatis k havis nur tri frankojn en la poŝo. Oni demandis lin, ĉu li tagmanĝis, sed li respondis: „Kiam oni ne laboras, ne estas necese manĝi."

Tiu ĉi viro tranoktis en *Gras*.

Verkis la lernantoj de l'geknaba lernejo el Gras *(Ardeŝ [Ardèche])*, *Francio*.

La mizero.

Hodiaŭ vespere mi postiras malfeliĉan virinon. Ŝi malbonodoris. Ŝi havis ĉifonan subjupon. Ŝiaj ŝtrumpoj malleviĝis sur siajn piedojn. Ŝi havis truitajn pantoflojn k la koto penetris tra la truoj.

En la kestoj por malpuraĵoj ŝi serĉis nutraĵon, ostojn, ĉifonojn. Kaj ŝi ankaŭ prenis, en sakon, ne tute bruligitan karbon por ekbruligi sian fornon.

Ŝi havis blankajn harojn k sulkojn sur sia vizaĝo. *Verkis lernantoj el* Soŝo *(Sochaux)*, *Du (Doubs)*, *Francio*.

Tiun ĉi materialon eltiris K-do H. Bourguignon[1] *el la grava kolekto de infan-gazetetoj, kiujn presas la geknaboj de la ekzistantaj 300 preslernejoj en Francio, laŭ la nova pedagogia sistemo, bazita sur libera inteligento de la infanoj, kiun ni nomis „Presarto ĉe Lernejo"*.

Mia patrino.

Ŝi neniam promenas kun ni, ŝi ankaŭ ne faras ekskursojn kun ni. Kial ne? Ĉar la patro jam depost du jaroj estas senlabora. Ni ne havas monon. Patrinjo ne scias, kiel aĉeti manĝaĵojn. Ŝi ĉiam flikas k ŝtopas, ĉar ŝi ne povas aĉeti novajn vestojn. Ofte la patrino koleriĝas, se ŝi vidas truojn en la ŝtrumpoj aŭ pantalonoj. Tiam ŝi estas malbonhumora, k ni rajtas nek kanti nek fajfi. Tiam mi scias, ke la mono forestas. Patrinjo ofte diras: „Aranĝi bonan tagmanĝon havante monon, ne estas arto, sed kuiri bongustan manĝaĵon sen mono, tio estas arto." Mi ĉiam ĝojas, kiam paĉjo ricevas la subtenon por la senlaboruloj, tiam estas la sola gaja tago en la tuta semajno. *Günter, 10 j.* (Berlin-Neuk.)

Mia patro.

Mia patro estas bona viro. Mi amas lin. Li ofte kantas k fajfas. Sed nur, se li estas bonhumora. Tiam li ankaŭ razas sin. Se li ĉagreniĝis pri la partio k la politiko, li ne kantas, tiam li ankaŭ ne razas sin. Tiam mi devas resti tute silenta. Kiam li ricevas la semajnan salajron, li ion alportas por patrino k mi. Nun ni estas gajaj. Patro amas la sporton, li ofte vizitas la piedpilk-ludejon. La kamaradoj amas lin. En la kunvenoj li ofte paroladas. Li ĉiam diras, ke la laboristoj devas unuigi sin, se ili volas progresi. Antaŭ kelkaj tagoj eĉ la gazetoj raportis pri la parolado de mia patro. Patrino estas tre fiera.

Viĉjo, 10 j. (Berlin-Neuk.)

La ŝtelisto.

Mia kara panjo k mi sidis sur la sofo legante fabelon pri Neĝblankulino. Subite kraketis ĉe la pordo. Mia patrino ektimis k diris mallaŭte: „Kio estas tio?" „Ho, mi respondis, estas certe la patro; li ja volis iri en la kelon por alporti lignon k karbojn." Sed, terure! mi ekvidis ĉe la pordo fremdan viron. „Helpu, helpu nin!" kriis la patrino k mi. „Jen ŝtelisto!" Ni volis foriri, sed ni falis teren. —

Vekiĝinte mi pensis: nur bone, ke mi nur sonĝis! *Edito, 10 j. (Berlin-Neuk.)*

[1] Adreson vd. en la antaŭa „L. L."